REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

komuna eldono de REU kaj REJM *№ 3 (10) majo 2002*

Al niaj aranĝoj revenas la legendoj kun siaj novaj kaj malnovaj kantoj: en RET-02 apud Kovrov parto-prenos kaj koncertos Ĵomart Amzeev kun Natalja Gerlaĥ, en REJo apud Kievo – Vladimir Soroka



en la numero

informoj pri someraj aranĝoj
lingvokulturologia studo de Aleksandr Melnikov
"krokodilologia" studo de P.Fiŝo
Sergeo Bozin: konfeso de muzikisto
"Bulteno de REU" kaj "REJM-info"
"Libra revuo", literaturaj paĝoj kaj multo alia

Moskvo, 2002

Klara Ĵlutoviĉ (Elektrostalj)

LA PRINTEMPA MATENO

Velkas ĉiam pli
la malfrua stel'
sur altego de firmament'.
Venas nova tag',
venas nova bel'
en tenere paca silent'.

Vigle ŝvebas jam
spiro de printemp'
en l' aŭrora blu' super ter'.
Venas nova tag',
venas nova temp'
en bonguste frida aer'.

Kuŝas en kviet'
la fidela plum'.
Hele sonas vok' de labor'.
Venas nova tag',
venas nova lum'.
Ĝin salutas danke la kor'.

UTILAJ ADRESOJ

REU: p/k 57, 105318 Moskvo; retadreso <esperanto@au.ru>; ttt-ejo <http://reu.da.ru>.

Libroservo de REU: p/k 4716, 432063 Uljanovsk; retadreso <yuka@vens.ru>; plena katalogo <http://reu.da.ru/rus/katalogo.htm>.

REJM: str.Lenina 40 – 14, 429120 Ŝumerlja, Ĉuvaŝio; retadreso <rejm@euro.ru>; ttt-ejo <www.tejo.org/rejm>.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; retadreso <uea@inter.nl.net>; ttt-ejo <http://www.uea.org>.

LA BONA LINGVO

Estontaj aranĝoj

REU invitas al RET-02

ĉiujn venintojn al la bazejo renkontos pioniro en verda kravato

La loko kaj dato. Ili restis senŝanĝaj – de la 15-a ĝis la 25-a de aŭgusto, en ĉarma bazejo apud Kovrov, Vladimira regiono.

Pri la kotizoj. Jam estas farita la interkonsento kun la bazejo pri la prezoj de loĝado kaj manĝado dum RET. La manĝado kostos 90 rublojn tage, eblos mendi aparte maten-, tag- kaj vespermanĝojn. Por la loĝado estos 4 kategorioj: 1) en tendoj – senpage; 2) en multlokaj ĉambroj en lignaj dometoj – 40 rubloj tage por unu persono; 3) en ŝtona domo, en 3-5-litaj ĉambroj kun lavejo kaj necesejo – 85 rubloj tage por unu persono; 4) en ŝtona domo, en 2-litaj duonluksaj ĉambroj – 260 rubloj por la tuta ĉambro tage. La programkotizo, destinita por gratifikoj al artistoj kaj programkontribuantoj, eksperimente estos libervola, t.e. ĝin pagos nur la dezirantoj.

Pri la programo. Pri la ĉefaj ideoj de la programo vi certe jam legis en la unua informletero. Nun la organizantoj evoluigas tiujn ideojn kaj aperigas la novajn. Estas propono dediĉi ĉiun tagon al iu certa temo. Proksimume tiel: "Metropoliteno" – tago de Varankin kaj E-literaturo; "Fundamento de Esperanto" – tago de Akuzativo kaj E-gramatiko; "La bona lingvo" – tago de la stilo; "Paŝoj al plena posedo" – tago de instruado; "Esperanto en perspektivo" – la interna kaj aliaj ideoj; "Historio de la monda lingvo" – tago de E-historio; "Senĝenaj dialogoj" – tago de aplikado; "Tutmonda sonoro" – tago de informado kaj varbado; "Kredu min, sinjorino!" – virinoj en Esperanto. Krome estas planate okazigi dum RET fakajn kunvenojn: "ILEI-Rusio" (Irina Gonĉarova), "Esperanto-servocentro" (Mikaelo Ĉertilov), "Esperanto-kreado" (Valentin Melnikov), "Maldekstra movado" (Nikolaj Gudskov) ktp. Okazos prelegserio pri "Movada teorio" (Ideologio de E-movado ks.). Ne mankos diversaj kursoj, konkursoj, diskutrondoj kaj aliaj tradiciaj eroj. Ankaŭ la kultura programo estos en RET tre altnivela. Ĵomart kaj Nataŝa jam mendas la biletojn de Stokholmo al Moskvo-Kovrov, intencas partopreni en la aranĝo ankaŭ multaj rusiaj aŭtoroj kaj kantistoj. Estas planate ĝuste en RET

same kiel pasintjare la baseno helpos dum varmaj tagoj

okazigi la provludojn por la registrado de la disko “Oraj kantoj-3”.

Averto. Al RET-02 ne estos akceptataj nululoj, t.e. personoj, neniam lernintaj Esperanton. Ĉiuj programeroj okazos en Esperanto sen iuj ajn esceptoj.

Kontaktoj kaj informoj. En junio ĉiuj aliĝintoj ricevos la 2-an informleteron. La organizantojn eblas kontakti poŝte pere de adreso de REU (vidu en la dua kovrilpaĝo), laŭ la sama adreso necesas sendi la aliĝilojn; rete <andreo@mailru.com>, <garik@mitino.ptt.ru>; telefone (83536) 59856 – Andrej Grigorjevskij, (095) 5677007 – Garik Kokolija.

Agrabla surprizo. Estas planate organizi busan vojaĝon al RET-02 el Moskvo. Laŭ la plano, buso startos la 15-an de aŭgusto ĉ. 10:00 – 11:00. Se troviĝos sufiĉa kvanto de dezirantoj, kaj se la prezoj estos realaj (momente la trajnbileto kostas 160 rub., do prezo por unu busloko devas esti ne pli ol 200 rub.), la busa veturo okazos. Nepre atendu konfirmon, ĉar eble tamen oni ne sukcesos ĉion aranĝi. La dezirantoj anonciĝu ĉe Grigorij Arosev rete <desperanto@mtu-net.ru> aŭ telefone (095) 4761472.

***

Pri la preparado de **OkSEJT-42** vi povas legi en REJM-info (paĝo 25).

***

Renkontiĝo de Amikoj (RA-2) okazos ĉi-jare dum 28.06-06.07 sur insulo en Obj-a maro, 105 km for de Novosibirsko, en la turisma bazejo “Kana paradizo” en pina ĉeborda arbaro. La kotizo – 1150 rubloj por la tuta periodo sendependе de la aĝo – inkluzivas: loĝadon (en lignaj 2-3-litaj dometoj – ĉirkaŭ 30 lokoj, kaj en specialaj tendoj, disponigataj de la bazejo), 3-fojan manĝadon, vojon de Novosibirsko al la bazejo (per buso dum 1.5 horoj kaj poste per motorkutroj dum 10 minutoj) kaj reen, du perpiedajn ekskursojn, unu viziton al banejo kaj programon. La programo inkluzivas Esperanto-lecionojn por komencantoj kaj progresantoj, lernadon de Esperantaj kantoj ĉe gitarludo, distraĵojn (naĝado, fiŝkaptado, sportaj ludoj) kaj aliajn tradiciajn erojn; ĉiuvespere okazos lignofajro. Kontraŭ aparta prezo oni povas partopreni en mara ekskurso per motorkutro. Atentu: kvanto de lokoj estas limigita. Aldonajn informojn eblas ricevi ĉe Katerina Arbekova: a/ja 107, Novosibirsk-78, RU-630078; rete <katka@drbit.ru>; retpaĝo <http://www.nekmovado.narod.ru/ESP/ra2.htm>.

RA-1 en 2001 lasis la plej bonajn rememorojn

***

Uljanovskanoj invitas vin ripozi dum la **“Ĝemeltagoj”** (12-16.06.2002) surborde de la rivero Volga. Tri tagoj estos respektive Neptun-tago, Puŝkin-tago kaj Ĉe-Gevara-tago. En la programo estos kursoj de vivrestado (psikologiaj kaj praktikaj), montgrimpado, perlumado, kajtofarado kaj fiŝkaptado. Okazos konkursoj pri sablaj skulptaĵoj kaj korpoarto, olimpikoj de “siamaj ĝemeloj” kaj multaj ludoj. La tendaro situos sur bordo de Volga, je 30-40 min. de la urba buso. Loĝado kaj manĝado – memzorge, en tendoj kaj per

lignofajro respektive. Programkotizo: 50 rub. surloke. Por ĝemeloj – 50%-a rabato. Aliĝu kaj petu informojn ĉe: Katja Krasnopjorova, <kato-cat@inbox.ru>, tel. (8422) 340896; Jura kaj Lena Karcev-oj, <yuka@vens.ru>, tel. (8422) 321343.

***

LETO – Libera Esperanto-TendarO

Somera Tendaro de Personeca Kresko. Turisme-tendara kunveno, organizata per fortoj de esperantistoj, por esperantistoj kaj iliaj amikoj-neesperantistoj.

Ĉu vi scias, kio kreskas ĉe via domo? Kiel nomiĝas fiŝoj en apuda rivero? Herboj sur ĝia bordo? Kiuj birdoj (krom la kutimaj kolomboj, kornikoj kaj paseroj) ĝenerale ekzistas? Povas esti, vi eĉ promenis en arbaro kelkfoje en la vivo? Eble, vi sciis tie iom pli da nomoj de kreskaĵoj, ol en afrika ĝangalo? Eble... Ĉu vi volas scii pli pri la naturo kaj povi vivresti en sovaĝaj kondiĉoj? Kompreni lingvon de kreskaĵoj kaj bestoj?

Speciale por vi 28.06.-04.07.02, senpere antaŭ la Gruŝin-festivalo en la sama loko okazos tendaro de personeca kresko LETO-02.

La temo estos "Nia Naturo". La tendaro estos plene tenda. En la tendara programo estas planataj: kursoj de Esperanto (laŭeble – diversnivelaj); korpoarto; lernado kaj praktikado pri maristaj/turistaj nodoj; kurso de gitarludo; ekskurso en arbaron kun akompano de profesia biologo, kiu rakontos pri tio, kio kreskas kaj kuras-rampas ĉirkaŭ ni; ekstremaĵoj – jam kutimaj kurado sur braĝo kaj kuŝado sur frakasitaj vitraĵoj, longdistanca naĝado, disvastigo de Esperanto. Rakontoj-prelegoj: tekniko de fotado per kvalitaj fotiloj; nasko en akvo; petveturinstruado; bazaj scioj de homa vivrestado en la naturaj kondiĉoj.

...kaj aldone: teatraj konkursoj ("tandemoj"); konkuroj pri petveturo, pri naĝado, turismaj konkuroj; diversspecaj ludoj.

Se vi deziras striktan lingvodisciplinon – LETO-02 por vi, verŝajne, ne tre taŭgos. Sed, tamen, se vi deziras paroli nialingve kaj paroligi la aliajn – bonvenon! Esperanto estos nepra parto de la programo, ĝia fono.

Aliĝkotizo estos 30-50 rub. La manĝojn alportu mem aŭ aĉetu en la proksimaj loĝlokoj, ekzemple en Pribreĵnij (je distanco de unu elektrotrajna stacio).

Kunprenu: tendon, dormosakon, plastan tapiŝeton, KTTK (Kruĉon, Teleron, Tranĉilon, Kuleron); vestaĵojn por ajna vetero; kontraŭ-pluvajn kaj -kulajn ilojn; gitaron (se eblas).

Kontakteblecoj: telefonnumeroj – (84235) 37079 Saŝenjka Sudakova, 59394 Denis Rogaĉov, 39563 Saŝa kaj Lera Ĥrustaljov-oj; retadreso <leto-2@narod.ru>; retpaĝo <http://leto-2.narod.ru>.

***

BONVENON AL SEZAM'!

Volgogradaj esperantistoj invitas vin al SEZAM' – la somera renkontiĝo, kiu unuafoje okazos la 8-14-an de aŭgusto 2002 apud Volgogrado.

Se vi kuraĝas, havas humursenton kaj opinias, ke vi povas regi la sorton per via volo; se vin fascinas la mondo de fabeloj kaj fantazioj, kaj vi dezirus mergiĝi en ĝin; se vi interesiĝas pri latentaj kapabloj de homo – tiukaze nia renkontiĝo estas ĝuste por vi!

Venu al ni kaj vi vivos dum semajno en la mondo, kie sociaj limoj perdas potencon super la konscio, kiu mergiĝas en nekredeblan mondon – ***la mondon de mitoj, fabeloj, astrologio kaj magio.***

Ĉiu tago, merganta vin pli kaj pli profunde en nekonatan mondon, estos akompanata per multaj amuzaĵoj. Gajeco kaj ŝercoj helpos konservi la klarecon de via konscio kaj fortigos vian menson por pli bona percepto de novaj scioj.

Ripozbazejo, en kiu okazos la renkontiĝo, ankoraŭ ne estas elektita. Tamen pro varmega

somero en nia regiono ĝi nepre situos ĉe unu el la riveroj: Volga, Don aŭ Aĥtuba. Kondiĉoj estos bonaj kaj prezoj malaltaj, ĉar ni elektas el ripozbazejoj, kiujn administras la regiona Komitato pri junularaj aferoj.

Aktualan informon vi povas ekscii en la ttt-ejo de Volgograda Esperantista Junulara Centro (VEJC) "Stelaro" <http://www.stelaro.by.ru>. Kontaktu nin poŝte (400094, Volgograd, str.Vostoĉno-Kazaĥstanskaja 6 – 46, Eduard Kolosov), telefone (8442) 358079 (ofica – Eduard Kolosov) aŭ (8442) 730538 (Anastasija Ĉugunkina), rete <edya@yandex.ru>.

***

SOMERA ESPERANTO-TENDARO EN LANČOV

30.06-13.07.2002, 14.07-27.07.2002, 28.07-10.08.2002

La Esperanto-Klubo en Třebič aranĝas Someran Esperanto-Tendaron (SET); ĝi okazos en tri etapoj, en la tradicia loko ĉe la digolago de Vranov apud la vilaĝo Lančov, distrikto Znojmo, en suda Moravio.

La instruado de Esperanto okazos ĉiutage krom dimanĉo de la 8-a gis la 12-a horo en tri diversgradaj kursoj: A – por komencantoj, B – por progresintoj, C – konversacia. La supozataj scioj por kurso C devas havi la nivelon de la lernolibroj "Paŝoj al plena posedo" (W.Auld), "La tuta Esperanto" (H.Seppik) ks. La lingvoscio en la kurso C devas esti tiagrada, ke la partoprenanto estu kapabla konversacii.

En la tendaro okazos ankaŭ kursoj de la angla, franca, germana kaj rusa lingvoj. En la 3-a etapo okazos ankaŭ kursoj de ŝakludo kaj pentrado. Ĉiu partoprenanto estos devigata frekventi iun el la kursoj kaj respekti la tendaran regularon, pri kiu oni estos informitaj surloke post la alveno.

La loĝado estos en kvarlitaj kaj kvinlitaj dometoj. La manĝojn oni ricevos ekde la tago de la veno (dimanĉo) ĝis la tago de la forveturo (sabato).

Posttagmeze okazos sinbanado, sportado, ekskursoj, vespere tendarfajroj kun kantado kaj aliaj programeroj. La ekskursoj – unu tuttaga al la ĉefurbo de Aŭstrio – Vieno, kaj du duontagaj – ne estas enkalkulitaj en la kotizo.

Ni invitas eksterlandajn samideanojn kun bona scio de Esperanto, kiuj laŭ ebleco povus ankaŭ kontribui al la tendara programo (ekz. prezenti sian landon aŭ loĝlokon, sed ankaŭ aliaj programeroj estas bonvenaj). Ni bonvenigas ĉies kunlaboron kaj proponojn por la programo.

La kotizo (3000 ĉeĥaj kronoj aŭ 95 eŭroj) inkluzivas kvin manĝojn tage, loĝadon kaj instruadon. Post ricevo de via aliĝilo ni informos vin pri maniero de la pago. Aliĝontaj grupoj devas havi akompananton, kiu bone regas Esperanton. Gvidanto, kiu akompanas 10-personan grupon, ĝuos 50%-an kaj gvidanto de 5-persona grupo – 25%-an rabaton.

Dum pli ol 49 jaroj partoprenis en SET geamikoj el preskaŭ ĉiuj eŭropaj kaj 5 transmaraj landoj. Por ĉiu etapo ni akceptos nur la unuajn 120 aliĝilojn. Tial ni konsilas al vi aliĝi kiel eble plej frue. La necesajn informojn rilate la alvenon, restadon kaj vivon en la tendaro ricevos ĉiu aliĝinto kune kun la konfirmo pri la akcepto.

Ni ĝojus, se ni povus bonvenigi ankaŭ vin en nia tendaro.

Klubo de Esperanto kaj mondaj Lingvoj (Ĉeĥa Respubliko)

<podhradska@volny.cz>, tel./registrilo (420-618) 851196, tel./fakso (420-618) 841909

***

Hispana Esperanto-Junulara Societo invitas al **Internacia HoRo-2002**. Ĝi estos Halanĝa? Hipia? Haloa? Hanta? Horora? Hispana? Heĝa? Homunkula? Hirunda? HEJSa? Hidalga? Higiena? Herda? Hobia? Holma? Harmonia? Hidra? Harda? Hida? Humura?… Renkontiĝo. Ĝi okazos de la 11-a ĝis la 18-a de julio 2002 en Salamanca (His-

panio). La plena kotizo por rusianoj estas ĉirkaŭ 160 eŭroj. La adreso por ekscii la detalojn kaj aliĝi estas: Hispana Esperanto-Junulara Societo, Rodríguez San Pedro 13 – 3º – 7, ES-28015 Madrid, Hispanio; tel. + 34 914 468079; rete <HoRo2002@esperanto-es.net>; la retpaĝo <www.esperanto-es.net/HEJS/HoRo2002/>.

***

La tradicia **15-a Internacia Junulara Semajno** (IJS) okazos la 25-31-an de julio 2002 en Székesfehérvár, Hungario, kun la devizo "Reĝa urbo – reĝa IJS", ĉar la urbo estas iama sidejo de reĝoj. En la programo estos tagaj kaj noktaj kursoj (ankaŭ E-kurso), vingustumado, akvopafilado, tuttaga ekskurso, Tradicia Balo, koncertoj, plaĝ- kaj diversaj aliaj umadoj. La plena kotizo por rusianoj estas inter 90 kaj 135 eŭroj. La adreso por ekscii la detalojn kaj aliĝi estas: Hungara Esperanto-Junularo, pf. 87, HU-1675 Budapest, Hungario; la retpaĝo <www.szekesfehervar.hu/esperanto>.

***

Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO) kaj Kastelo Greziljono invitas al **FESTO** – internacia junulara renkontiĝo de la 30-a de aŭgusto ĝis la 7-a de septembro 2002. Ĉefa enhavo de la programo estas tutsimple senĉesa festo. Okazos interalie koncertoj, fotoateliero, vizito al strangatipa preĝejo de la regiono, kaj eĉ vizito al la Greziljona abelujaro… La plena kotizo por rusianoj estas ĉirkaŭ 110 eŭroj. La adreso por ekscii la detalojn kaj aliĝi estas: Didier Loison, Boîte 1872, 223 rue Vercingétorix, FR-75014 Paris, Francio; retadresoj <bhugon@esperanto.org>, <dloison@esperanto.org>, <cpoullet@oreka.com>.

***

La **13-a Montkabana Renkontiĝo** okazos de la 26-a ĝis la 29-a de septembro 2002 en Logarska dolina, Slovenio, 40 km norde de Ljubljana. Kiel kutime, la ĉefa programo de la renkontiĝo estas migradoj. La organizantoj rekomendas antaŭan membriĝon al via loka montmigra asocio, ĉar ĉiujn aktivecojn oni partoprenos proprariske. La plena kotizo por rusianoj estas de 44 ĝis 74 eŭroj. La adreso por ekscii la detalojn kaj aliĝi estas: Vanja Radovanović, Horvaćanska 31, HR-10000 Zagreb, Kroatio; retadresoj <vanja.radovanovic@etk.ericsson.se>, <mea.bombardelli@math.hr>; la retpaĝo <http://www.angelfire.com/va2/Vanja/>.

***



La Germana Esperanto-Junularo invitas vin al la **46-a Internacia Seminario** kun la temo "Ekstremismo – specoj, originoj, efikoj", kiu okazos de 27.12.2002 ĝis 03.01.2003 en Trier – la plej malnova urbo de Germanio. Kadre de la temo la partoprenontoj diskutos pri la diversaj formoj de ekstremismo kiel ekzemple ekstrema politiko, religio aŭ sporto. Sed certe ne mankos ankaŭ multaj aliaj tradiciaj por ISo programeroj kaj distraĵoj. La plena kotizo por rusianoj estas de 15 ĝis 192 eŭroj. La adreso por ekscii la detalojn kaj aliĝi estas: Martin Sawitzki, Max-Planck-Ring 8d/L 56, D-98693 Ilmenau, Germanio; retadreso <is.admin@esperanto.de>; retpaĝo <http://www.internacia-seminario.de>.

ESPERANTO, KULTURO, EMOCIOJ, KAJ ESTETIKO – KIOM KUNIGEBLAJ ILI ESTAS?

(Lingvokulturologia studo)

1. Bazaĵoj de priesperanta lingvokulturologia esplorado

Ĉar nia eseo, sendube, ne pretendas esti ia 'La Vero en la lasta instanco', kiun oni senrezerve kaj senpruve akceptu kiel kredendaĵon, ni devas konturi kelkajn principojn de argumentado kaj pruvado, kiujn oni ofte ne konsideras diskutante pri Esperanto.

Unue. Kio estas Esperanto (plue – Eo; en derivaĵoj/kunmetaĵoj – E-)? La klasika respondo tekstas: **Eo** estas internacia **planlingvo.** Ĉi-diraĵo estas… absurda. Planlingvo kiel idiomo, kiun oni planis, ne ekzistas! Vere planita povas esti nur **lingvoprojekto**. Ekde kiam ĝi forlasas la cerbon de sia kreinto kaj ensociiĝas, ĝi ne plu estas plana. Ĝi komencas la propran vivon (same kiel ĉiu homa naskito) kaj evoluas laŭ sia propra logiko (ne malofte malkonkorde kun la esperoj, kiujn havis ties kreinto). Tamen, *planlingvo* estas ĝenerale akceptita termino, kiun ni ne alvokas forigi, sed, jes, adekvate kompreni. Eo estas **plana** (pli frue oni diris *artefarita*) **laŭ sia origino, sed ne laŭ la aktuala stato.** Hodiaŭ ĝi estas **viva** lingvo **de interkultura komunikado,** kies evoluo estas ne multe pli regulata (kaj eĉ regulebla!) 'de supre' ol tiu de etna lingvo[1].

Aleksandr Melnikov: Kredu min, gesinjoroj!

Due. Eo estas **internacia** planlingvo. Ankaŭ tio estas ĝusta ne 100%-e. Oni ja uzas Eon por komunikado kun samlingvanoj. Sed: same, kiel eblas enbati najlojn per komputilo, oni povas uzi Eon anstataŭ sian komunan etnan lingvon ene de la sama etno. La demando estas, kio estas pli celkonforma. El ĉi-evidenta rezono sekvas, ke **oni ne rajtas** kompari Eon kun etnaj lingvoj **en ilia 'denaska' funkcio**[2] (priservo de sia etno), **sed, jes, en la funkcio de internacia komunikado.**

Trie. Traktante lingvajn problemojn, oni ofte aplikas la terminojn **'lingvoportanto'** kaj **'averaĝa etnano'**. La enhavo de tiuj terminoj koncerne Eon iom(eg)e specifas. **Etnolingvofonoj/portantoj** kutime parolas koncernan lingvon **denaske** aŭ almenaŭ **ĉefe**, plejparte ĝuste ĝin; por ili la etna lingvo estas komunike (tempe kaj amplekse) **primara** dum E-lingvoportantoj estas personoj, regule uzantaj Eon kaj partoprenantaj la E-movadon (inkluzive legadon de E-periodaĵoj kaj libroj), sed por ili E-komunikado estas preskaŭ ĉiam **sekundara**[3]! 'Averaĝa etnano' sufiĉe bone posedas

---

[1] Ekzemple, kaze de Eo neniu planis/celis kreon de specifa E-kulturo, reflektiĝanta en la lingv(aĵ)o kiel 'vortoj kun kultura ingredienco', esperantonimoj ktp. Temas pri 'kabei, krokodili, fina venko' kaj multaj aliaj. Ĉio okazis spontane rezulte de natura evoluo de la E-sociumo kaj la priservanta ĝin lingvo.

[2] Kiel trafe diris Jorn Lund, la ĉefredaktoro de la Granda Dana Enciklopedio (kies lasta volumo estas eldonita en 2001): 'La dana lingvo estas la plej bona lingvo de la mondo. Por danoj.'

[3] Maloftaj kazoj de relativa primareco en la uzo de Eo estas ĝia apliko en internaciaj familioj kie ĝi estas prioritata – ofte la sola komuna por la geedzoj – kaj oficado ĉe UEA, kies labora lingvo estas Eo.

koncernan lingvon en ties praktika uzo kaj apartenas al la plej oftaj (almenaŭ vaste reprezentitaj) tipoj de lingvouzantoj, sed 'averaĝa esperantofono' havas malpli altan lingvonivelon, tial por kompari la kompareblajn ni enkonduku terminon ***tipa esperantisto*** (plue TE), per kiu ni markos **kulture elitan** esperantofonon, kiu havas ne nur signifan lingvoposedon, sed ankaŭ vastajn fonajn sciojn pri la E-kulturo kaj movado.

Kvare. Parolante pri **(mal)avantaĝoj** de Eo kompare kun etna lingvo, ni devas nepre aldoni, en kiu **situacio** kaj por kiu **funkcio**. Por la ĉiutaga, komerca, scienca apliko la gvidan rolon ludas la **komunika-informa** funkcio, en la arto kaj kulturo – la **emocia-estetika**. La dua grupo **bezonas ambiguecon** (plursignifecon), la unua **evitas**. Por la unua la **formo** de inform-komuniko estas multe malpli grava ol por la dua. Tial kaj pro aliaj kaŭzoj en la du specoj de la homa komunikado estas prioritate aplikataj **malsamaj** rimedoj por atingi la maksimuman efekton kaj efikon. Ĉar Eo estis konceptita kiel lingvo de ajnaspeca komunikado, ĝi devis respondi al du tute kontraŭaj postuloj. Rezultis kompromiso. Iuj trajtoj de ĉi-lingvo pli konformas al pragmataj celoj de informo-transdono, aliaj – al kreo de kulturaj/estetikaj/emociaj valoraĵoj.

Kvine. Eo apartenas al internaciaj planlingvoj (plue – IPL-j). Tial estas interese, kion pri tiu lingvo-klaso kaj ĝia kapablo servi kiel idiomo de kulturo, emocioj kaj estetiko pensis fakuloj: kaj de t.n. '**granda lingvistiko**' kaj de ties eta frat(in)o – **interlingvistiko**.

Multaj renomaj lingvistoj, kvankam ne interlingvistoj (K.Brugmann, A.Meillet, A.A.Reformatskij, O.S. Aĥmanova[1] k.a.), opiniis, ke la destino de IPL-j estas priservi nur *ĉiutagan komunikadon, sciencon kaj teknikon*. Eĉ interlingvistoj kiel A.Gode (nomebla la patro de Interlingua) kaj S.Bakonyi kontestis eblecon de aŭtonomaj IPL-j (AIPL) esti portantoj de kulturo simple pro tio, ke AIPL-j estas tro malproksimaj de la etnaj lingvoj (tamen, A. Gode agnoskis almenaŭ la ekziston de sufiĉe vasta literaturo en Eo). La asertata kaŭzo de la 'senkultureco kaj senestetikeco' de la E-tipaj IPL-j estis ilia 'malkapablo havi *stilajn karakterizaĵojn, esprimivajn vortojn kaj parolturnojn*[2]*, manko de jarcentaj tradicioj kaj de koncerna popolo'*.

Bedaŭrinde, en tiuj pritaksoj oni ofte forgesis, ke lingvo estas *nek lingvoprojekto, nek eĉ fakto, sed ja procezo* (ĉar ĝi konstante ŝanĝiĝas). Do, eĉ se iu ajn aserto el la ĉi-supraj estus prava en la momento de IPL-apero, tio tute ne signifas, ke ĝi ne povas eks-ĝustiĝi poste. Krome, ĉar ajna lingvo estas *sistemo de sistemoj*, kies optimumoj kontraŭdiras unu la alia(j)n, apero de faktoj kaj fenomenoj 'malplibonigantaj' la lingvon iuaspekte povas 'plibonigi' ĝin aliaspekte. Kio resume pli gravas, decidas socia bezono (aŭ iam hazardo?).

Tial la sola pravigebla maniero trakti la tuŝitajn problemojn, estas esplori la **faktajn staton kaj evoluon** de la lingvo **surbaze de ties tekstoj**. 'Teksto' ni nomos iun ajn manifestiĝon de homa enlingva parolo/skribo. Tiam ni malkovros, ke en ĉiuj sufiĉe evoluintaj planlingvoj nepre aperas literaturaj verkoj (komence tradukoj, poste provoj de

---

[1] En 1956 O.S.Aĥmanova kaj E.A.Bokarev (verŝajne, iniciate de Bokarev) konstatis, ke "Esperanto kapablas kontentige transdoni ne nur la enhavon de la originalo, sed ankaŭ ĝiajn belartajn specifaĵojn, ĉar la esprimivaj eblecoj de tiu lingvo estas sufiĉe grandaj, eĉ koncerne la idiomaĵojn". En 1980 O.S.Aĥmanova kaj V.J.Zadornova (supozeble, influe de Zadornova) senigis, tamen, Eon de 'atencoj je beleco'. Sed malgraŭ la teoriaj asertoj kaj prognozoj, en la praktiko la belliteraturo en Eo sukcese evoluis ĝis tiu grado, ke je la mezo de la 1970-aj ĉirkaŭ 20 romanoj estis eĉ tradukitaj el la Esperanta originalo en aliajn lingvojn kaj en 1983 komencis funkcii Esperantlingva Verkista Asocio (EVA), al kiu en 1991 aldoniĝis Esperanta PEN-Centro, kreskis kaj evoluis la teatra, kanta, retorika, publicistika k.a. E-artoj kun vorta ingredienco.

[2] Laŭ tiuj sciencistoj, se simila esprimeco kaj idiomaĵeco en IPL aperus, tiu lingvo perdus siajn ĉefajn kvalitojn: simplecon, logikecon, kompreneblon por diversnaciaj lingvo-uzantoj.

originala kreado)[1]. En kelkaj lingvoj tiu tendenco eĉ malkonkordas kun postuloj de la koncerna-lingvaj teoriuloj. Ekzemple, unu el la teoriistoj de la Ida reformo, R.Lorenz, akre kondamnis kreadon de beletraĵoj en la IPL atribuante al ili (ankaŭ al Ido) nur pragmatajn funkciojn. Malgraŭ tio, Ido evoluis ĉi-sence same kiel la aliaj ensociiĝintaj (=realiĝintaj en praktiko) planlingvaj projektoj: scienc-teknikaj verkoj en ĝi evidentiĝis malpli multaj ol la literaturaj. Simile, en *la unua etapo* la pragmata funkcio de la plej disvastiĝinta IPL Eo cedis sian primarecon *al la esprimiva (estetika) funkcio*.

2. Premisoj por estetika/emocia funkcio de IPL

Opinie de W.A.Verloren van Themaat por esti kulturportanto (ne nur konservi la malnovan, sed ankaŭ krei novan kulturon – A.M.) lingvo devas respondi al la 3 kondiĉoj: 1) **lingvistika** (kapabli transdoni kulturajn valorojn per la *strukturaj rimedoj* de la koncerna lingvo); 2) **makrokultura** (havi *bazon en la moderna socio*; cetere, ne esti fremdeca al la ekzistantaj lingvoj kaj kulturoj); 3) **mikrokultura** (havi *mikromedion*, kiu sufiĉe *stimulas kulturan evoluon*).

Ĉion ĉi Eo havas. **Strukture** Eo sufiĉe riĉas por esprimi ĉion bezonatan. **Makrokulture** Eo neniel konfliktas kun la moderna socio kaj ties kulturoj, ĉar ĝi baziĝas sur ili kaj mem estas ilia parto. Ja ĉiu E-fono nepre apartenas al iu(j) el mondaj kulturoj kaj tiel senkonscie ligas la kulturon de Eo kun la propra. En ĉiuj kulturoj estas io komuna (t.n. kulturaj universalaĵoj), kio fikseblas en Eo. Krome, la lingvistika (ĉefe leksiko-rilata) deveno de Eo surbaze de ĉefaj eŭropaj lingvoj neeviteble ligis Eon al la aliaj lingvoj kaj per tio al aliaj kulturoj, ĉar lingvo kaj kulturo neimageblas unu sen la alia. **Mikrokulture** E-istoj havas evoluintan infrastrukturon interne de la movado, kiu ĉiel stimulas kulturumadon pere de Eo: aperas libroj kaj periodaĵoj, okazas konkursoj, renkontiĝoj, teatraj kaj kantaj prezentiĝoj ks.

Estas malfacile pruvi kapablon de Eo esti esprimiva rimedo al tiuj, kiuj ne parolas Ee. Sed por ni, E-fonoj, sufiĉus citi nur unu ekzemplon el E.Privat: 'A) Ŝi iris el la vendejo je la deka. Mi estis atendinta ŝin ekstere de la naŭa kaj duono. La pluvo tre malsekigis min.' (Neŭtrala, informa modelo.) 'B) Finfine ŝi aperis el tiu butikaĉo! Horojn mi atendegis sub pluvo kaj estis dronigita ĝis ĉemizo!' (Emocia prezento de la sama okazintaĵo.) Komentante la ĵusan specimenon, ĝia aŭtoro trovas jenajn rimedojn por transdoni sentojn per Eo: 1) sona plilaŭtigo de iu aŭ alia frazero (prozodiaj rimedoj – A.M.); 2) aranĝo de la frazo en iu aŭ alia ordo (sintaksaj, vortordaj rimedoj – A.M.); 3) ripeto aŭ forigo de vortoj (elipso, ripeto, pleonasmo – A.M.); 4) elekto inter ekzistantaj vortoj (leksikaj premisoj – A.M.); 5) kreo aŭ modifo de vortoj (vortfaraj ebloj – A.M.). Ĉio ĉi veras, sed ne elĉerpas la estetikajn/emociajn eblecojn de Eo.

Sed, se paroli malpli konkrete, **kio** en lingvoj ĝenerale kaj Eo specife **ebligas** aperon de **estetika/emocia/kulturporta funkcio**?

"Se Eo estas tre bona rimedo por transdoni pensojn, – atentigis E.A.Bokarev, – tiam ĝi nepre iĝas rimedo por transdoni ankaŭ sentojn, estetikajn travivaĵojn… Kiaj premisoj ekzistas por tradukante en Eon, ni diru, filozofiajn verkojn de L.N.Tolstoj, ne traduki liajn beletrajn verkojn? Ja la stilo de la filozofiaj verkoj de Tolstoj ofte estas ne malpli komplika ol la stilo de liaj rakontoj."[2] Alivorte, preciza/strikta *limo inter la belarta kaj la ĉiutaga* en

---

[1] En la libro-katalogo 'Bibliographia de Interlingua' (1999) scienco estas reprezentita nur per kelkaj filozofiaj verkoj de unusola aŭtoro, pluraj interlingvistikaĵoj, libro pri demografio kaj per 16-paĝa broŝuro pri uzado de diverstipaj retortoj, dum beletro – per pli ol 30 verkoj (prozaj, teatraj, poeziaj, tradukitaj kaj originalaj) plus anekdotoj, legendoj, kuriozaĵoj ktp. (Religiajn, esoterajn k.s. verkojn ni ne konsideris.)

[2] Ĉi tie kaj plue tradukis el la rusa la aŭtoro de la artikolo

kiu ajn lingvo *ne estas markebla*.

Asertante neeblecon de estetika funkcio ĉe Eo, oni ofte subkomprenas neeblecon verki *beletraĵojn*. Ĉi-rilate konindas la opinio de C.Todorov, kiu hipotezas, ke ĉiu tipo de diskurso, difinata kutime kiel literatura, havas neliteraturajn 'parencojn', pli proksimajn al ĝi, ol iu alia tipo de 'literatura diskurso' kaj tial *anstataŭ la opozicio 'literaturo/neliteraturo' oni parolu pri diversaj tipoj de diskursoj*.

Esencas ankaŭ pensoj de Todorov pri *tropoj* (metaforo, metonimiaĵo, sinekdoĥo), kiuj estas gravega rimedo de literatura kreado. Evidentiĝis, ke la fakta diferenco inter tropoj kaj neŭtralaj konstatoj estas nur en la operacio de kondensado/implikado, rezulte de kiu *konstato transformiĝas en tropon*.

S.N.Kuznecov asertis, ke IPL, celante peradon inter evoluintaj naciaj kulturoj, mem devas *atingi certan evolu-stadion*. Kaj tio, ni daŭrigu, postulas ĝian uzadon en laŭeble *ĉiuj* tiuj sferoj, en kiuj aplikiĝas la etnaj lingvoj, ĉar ĝuste tio (multsfera uzado) riĉ-evoluigas la lingvojn kaj faras ilin kapablaj esprimi ĉion esprimendan. Interese estas ĉi-rilate rememori ankaŭ la diraĵon de V.Kostomarov, substrekinta, ke niatempe la *evoluo de la kulturaj kaj artaj funkcioj* de la lingvoj estas *unu el la kondiĉoj*, sen kiuj 'ne eblus funkciado de ĉi tiu nacia lingvo en la rolo de monda, ĉar interŝanĝo de scienc-teknikaj informoj kaj kulturaj atingoj estas la plej oftaj manifestiĝoj de la internacia komunikado'. (V.K. traktas etnajn lingvojn, sed la samo ĝustas ankaŭ pri la IPL-oj, ĉar ankaŭ ili bezonatas antaŭ ĉio por priservi la plej oftajn direktojn de la internacia komunikado.)

> Ĉefo donas al la sekretariino du disketojn:
> – Lenjo, bonvolu kopii tiun ĉi disketon al tiu pura.
> Post du minutoj ŝi revenas pre-skaŭ plorante:
> – Ivan Ivanoviĉ, la kopiilo difektis la puran disketon.
> ***(esperanto-anekdotoj)***

Premisoj de IPL-uzado por estetikaj celoj kuŝas, laŭ observoj de A.D.Duliĉenko, krome, en la *individua karaktero de la kreado,* kiam decidas aparta homo, dum por la enscienca, administra-politika k.a. uzado estas bezonata konsento de vasta publiko, potenc-organoj ks.

Gravas, ŝajne, ankaŭ la *aksiologia (=rilata al valoro, valor-taksa) kriterio.* La uzata lingvo kaj la uzanta persono estas tre intime ligitaj. Tial la homo devas estimi sian lingvon por alte taksi sin mem. Kaj lingvo ne uzata por estetikaj celoj estas konsiderata (kaj en kaj ekster la IPL-adeptaro) malsupereca, nematura, primitiva.

Pravas, fine, ankaŭ G.Barczi, kiu vidas en la uzado de IPL por literaturo kaj scienco unu el la garantioj de *prevento kontraŭ disfalo de IPL je dialektoj* (unueciga funkcio).

Sed *baze* de ĉiuj eblaj argumentoj kuŝas nur 4 faktoroj: 1) *universala psika-fiziologia* naturo de ajna homo, sendepende de lia/ŝia aparteno al iu etno kaj iu lingvo; 2) *socia karaktero* de homo; 3) *interligiteco kaj kontraŭdireco de ĉiuj mondaj realaĵoj*, kio kondukas al ebleco reliefigi diversajn erojn de la ligoj, trakti ilin malsame, sekve al apero de variaĵoj kaj ambiguaĵoj en homa lingv(aĵ)o; 4) konkretaj *strukturaj trajtoj* de ĉiu unuopa lingvo. El tiuj ĉi kvar premisoj originas *lingvaj universalaĵoj* kaj *apartaĵoj*. Kaj kiam temas pri IPL-j, kiel gravegaj faktoroj aldoniĝas ilia *sekundareco kaj inter-nacia/kultura karaktero de komunikado.* IPL-j *ĉiam* estas uzataj nur *suplemente* al etnaj lingvoj; do, IPL-fonoj konstante spertas *premon* de la gepatraj kaj aliaj uzataj fremdaj lingvoj. La lasta kialo sekvigas, ke ĉiu IPL-fono havas *sperton* pri estetika uzo de sia ĉefa/prioritata lingvo. Konscie aŭ ne, li/ŝi *projekcias* tiujn spertojn je IPL. Aliflanke, IPL-j laŭdifine estas destinitaj por *inter*-etna/lingva/kultura uzado. Tial en IPL povas estetike *normiĝi* nur tio, kio estas sufiĉe *universala*.

Unu el *la universalaj fenomenoj kaj tendencoj*, kiuj rilatas al ajna viva (=reale uzata por ĝenerala komunikado) lingvo, sendepende de ĝia origino, estas *kvanta/'uzusa' faktoro*. En ĉiu lingvo formiĝas ne nur eblecoj ('kio ne kontraŭas la gramatikon, fonetikon kaj leksikon de la koncerna lingvo'), sed ankaŭ faktaj manifestiĝoj (t.n. 'uzuso', tio, kion oni *fakte*

kutime uzas en parolo: la plej oftaj vort-kunoj/kombinoj, gramatikaj apartaĵoj ktp.). Same kiel en aliaj lingvoj, IPL-teksto-konsumanto senkonscie prognozas/anticipas erojn aperontajn tuj-sekve, ĉar en neniu lingvo oni parolas per vortoj, sed jes ja per diversspecaj kliŝ(et)oj aŭ kliŝeskoj. (Kaj tio ne nepre estas 100%-aj frazeologiaĵoj, kiel ekzemple la rusa 'бить баклуши', kies senco tute ne diveneblas el la signifo de la inkluditaj en la idiomaĵon vortoj. Cetere, plej ofte la senco de uzataj 'kliŝoj' estas facile konkludebla el la senco de la eroj.) Do, perceptante lingvaĵojn, oni atendas kliŝojn kaj vidante/aŭdante ilin, oni reagas neŭtrale. Sed kiam aperas iu devio de triviala sekvo-ordo tio kaŭzas psikan *ŝoketon*, kiu kuŝas en la *bazo de estetika/emocia valoro* (pozitiva aŭ negativa). Kaj tial en ĉiu vaste uzata lingvo en iu momento (de ties matureco kaj socia bezono) devas aperi ebleco uzi la lingvon por estetikaj celoj.

Alia lingva universalaĵo rilatas al *varieco* en diversaj lingvo-tavoloj. En monografio de la Instituto de Lingvoscienco de USSR estas menciitaj jenaj potencialaj diverĝoj de leksiko: leksiko-semantikaj, fonetikaj, fonetikaj-morfologiaj, morfologiaj (t.n. vorto-formoj), stilaj, dialektaj, sociaj, etimologiaj varioj (t.n. duoblaĵoj ktp). Kial almenaŭ iuj el tiuj fenomenoj ne ekzistus en Eo?[1] Kaj se estas varioj, estas ankaŭ ilia ofteco en parolo. Kaj jam pro tio netradiciaj formoj povas havi estetikan efikon.

Vivante en socio, homoj ellaboras *konvenciojn*, kiuj senevite reflektiĝas en lingvo (tiel aperas tabuaj vortoj, parol-etiketoj ktp.). Ekestas *normoj* akceptataj indiferente ĝis la momento, kiam oni *rompas* ilin.

Aleksandr Melnikov (Rostov-na-Donu)

(daŭrigota)

Meze de majo 2002 okazis vizito en Litovion de la prezidanto kaj vicprezidanto de UEA. Sur la foto vi povas vidi (de maldekstre) Lee Chong-Yeong, Povilas Jegorovas (prezidanto de Litova E-Asocio) kaj Renato Corsetti dum unu el gazetaraj konferencoj en Litovio (la foto de Choe Taesok).

[1] Por ne esti senpruva – jen nur kelkaj ekzemploj el Eo: "maljuna" (ĝeneraluza) – "olda" (poezia); "preferindeco" (derivaĵo de "preferi") – "avantago" (senafiksa); el la kvar formoj, kiuj esence signifas la samon, influe de sia gepatra lingvo rusaj E-fonoj pli ofte elektos 'partizano', francoj – 'gerilano' aŭ 'makisano', angloj – 'insurgento', ĉar en la koncernaj lingvoj ekzistas similformaj korelativaĵoj.

LINGVA DISCIPLINO
Sovetiaj tradicioj

"Se ni estas tiel kurtmemoraj, nova generacio same nin forgesos"
J.Muraŝkovskij, sekretario de URSA (Ukrainia Regiono de SEJM-Aktiveco)

"Antaŭ nur kvin jaroj la lingva nivelo en niaj tendaroj estis perfekta."
V.Melnikov, 1995

Hodiaŭ de ĉiu flanko ni povas aŭdi plendojn pri malalta lingvodisciplino en nunaj tendaroj. Verdire mi aŭdas tion dum la tuta mia tendara staĝo (ekde 1991), kaj ofte la plendantoj mencias ankaŭ min, kiel unu el la kulpantoj. Mi decidis esplori, ĉu vere mi kaj miaj amikoj ŜĈKĤLandanoj kulpas pri pereo de la lingva disciplino en la tuta Rusio kaj eĉ eks-Sovetio?

Por la esploro mi provis trarigardi (post)sovetian E-periodaĵaron, kaj la plej interesajn informojn ĉi-rilatajn mi prezentas sube. **Titolo de artikolo estas diklitera**, poste sekvas nomo de aŭtoro: "En la citiloj estas neŝanĝitaj eltiraĵoj el prezentataj numeroj". [En la kvadrataj krampoj estas paŭzoj kaj miaj klarigoj/komentoj.] Poste sekvas *kursive miaj komentoj,* se bezonatas.

Nu, ek-ek…

"Aktuale" estas mia ĉefa fonto pri la sepdekaj jaroj:

№ 7(11), 1974
Konciza protokolo de la 8-a konferenco de SEJM-konsilantaro.
Temo: Interna kluba vivo, B.Kolker: "…Eĉ aktivuloj faras dum parolado multe da eraroj."
Temo: Someraj aranĝoj kaj iliaj perspektivoj, S.Smetanina,: "La disciplino en [Esperantista-studenta konstru]taĉmento ne estas tre bona. La lingvonivelo en taĉmento estas tre malalta";
A.Gonĉarov: "Estas propono organizi du tendarojn […] 3. laŭ lingva nivelo (komencanta, spertula). Al mi plaĉas la tria propono: duperioda tendaro, komence por komencantoj kaj poste por lingvosciantoj."

Tre severa propono, ĉu? Verŝajne la afero ne tre brilis, se A.Gonĉarov pretis detranĉi gravegan parton de SEJT. Tamen aŭdeblas voko de konscio:

N.Cvileneva: "Progresantoj devas vidi, ke eblas bone paroli Esperante amase."

Sed ne timu, ĉar la propono de A.Gonĉarov ne estis akceptita, tamen en sekvaj jaroj li fojfoje revenis al la ideo.

№ 9(13), 1974
Pri rajto partopreni tendarojn, B.Anoĥin: "Ĉu rajtas SEJM-reprezentanto (mi) rekomendi tiujn 4 [komencantojn] kun nur 6 spertuloj? […] Fakte, kiom da komencantoj (duonkrokodiloj, krokodiloj) oni rajtas venigi al tendaro kune kun 1, 2, 3, 5, 10, 25 aktivuloj-spertuloj? […] ellaborinte regularon pri partoprenrajto, ni evitos eblajn malagrablaĵojn pro abundo de 'krokodiloj' en la tendaro."

Kaj daŭre la aŭtoro prezentas klaran "aritmetikan" solvon de la problemo. Certe la propono ne restis senresponda:

№ 11(15), 1974
Al la redakcio de "Aktuale", O.Ŝtraler: "… ni tute ne devas konkretigi, kiom da komencantoj rajtas veni al tendaro kun unu aŭ kelkaj spertaj E-istoj. […] plejparte la problemon de malbona lingvoposedo solvos la kvintaga antaŭtendara preparperiodo por komencantoj."

***, D.Kolker: “ [En ukrainia interurba renkontiĝo de E-istoj] klubanino A.Medvedeva gvidis ekskurson […] bedaŭrinde ŝi kuraĝis nur kelkajn enkondukajn vortojn diri en E, la cetero estis rusa …”



№ 1(16), 1975

Ne forgesu: “Muzo” okazas ĉiujare!, V.Bingelis: “‘Muzo’ daŭris en tre bonaj kondiĉoj: forestis krokodiloj, ne estis tro granda kvanto da partoprenantoj.”

Jen estas bonega lingvonivela atingo! Tamen la kvanto de la partoprenantoj ne troas – 26 “... kaj 6 (bedaŭrinde nur 6) partoprenis foreste”.

№ 2(17), 1975

SEJM-delegitoj, D.Cibulevskij [tiama vicprezidanto de SEJM pri eksterlandaj aferoj]: “… mi proponas […] fari elekton de kluba SEJM-delegito, kiu nepre devas: 1. Bone scipovi Esperanton.”

Verŝajne la lingvonivelo de tiamaj aktivuloj estis sufiĉe “bona”, se ĝin necesas aparte atentigi.

Ankoraŭfoje pri disciplino, P.Jegorovas, S.Gajdamaviĉius: “La gvidantoj de kluboj devus limigi venadon de ili [‘krokodiloj’] al renkontiĝo, ĉar ili vere negativas je sukceso de la renkontiĝo. Ni dezirus, ke ili ne superu 20% de ĉiuj venintoj (el ĉiu loko).”

№ 6(21), 1975

Eĥoj de boata marŝo, P.Jegorovas: “La sola manko – ofta krokodilado, kio denove montras nedisciplinecon (ni ja en la informilo skribis: ‘Krokodiloj al ni ne plaĉas’). […] La unua kaŭzo – malalta kvalito de E-kursoj, post kiuj komencantoj ankoraŭ preskaŭ ne parolas.”

№ 10(25), 1975

Progresantoj en SEJT [rezultoj de “negranda sociologia esploro inter anoj de paroligaj kursoj”], A.Gonĉarov: “6. Necasas pli severa puno por krokodiloj (!). […] Fine, skribis ja progresantoj!”

Doneck atendas vin, URSA-komitato: “Al la renkontiĝo ni invitas geesperantistojn (ne krokodilojn!)…”

№ 11(26), 1975

Opinio de “krokodilo” pri SEJT-17, L.Mirgorodskaja: “… oni ne devas preteriri ‘krokodilojn’ kun trofiera rideto kaj eĉ silente […] Interese, kial Kolker povas ion klarigi en ĉeesto de ĉiuj, sed aliaj ne povas […] en Esperanto oni povas al ‘krokodiloj’ klarigi tiel, ke ĉio estas klara (kiel ekzemplo – Perevertajlo).”

№ 12(27), 1975

“Muzo – 75”, M.Gilinskij: “… la lingva nivelo de la renkontiĝo estas tre alta, verŝajne, eĉ pli alta ol tiu de SEJT-oj.”

OSER-25 en Barnaul, V.Sapoĵnikov: “La plej grava manko de la tendaro [SEJT-17]: la aktivularo ofte ignoris komencantojn. […] En la armeo ekzistas tia nelegala dispartiĝo je ‘avoj’ kaj ‘salagoj’.”

№ 3(30), 1976

Volgo-Urala Renkontiĝo, V.Dobridina: “… dum regionaj renkontiĝoj tre lamas la lingva nivelo, ĉar multe da komencantoj partoprenas renkontiĝojn (pli ol duono). […] ĉu dum renkontiĝo ni multe okupiĝas pri komencantoj? Nur dum la horo de konatiĝo (1 horon)! Kaj

iomete dum bankedo. Kaj ĉio! Mi havas proponon organizi REVU sen komencantoj…"

Jen estas bona propono! REVU sen komencantoj, "Muzo" sen ĉeestantoj, kio plu? Ĉu Esperanto sen parolantoj? – kaj ne plu estas lingvonivela problemo!

№ 1(34), 1976/77 [ekde ĉi kajero "Aktuale" indikas numerojn laŭ agadjaro]

Konciza protokolo de la jubilea 10-a konferenco de SEJM-konsilantaro.

Temo: Rezultoj de la Paroliga periodo, A.Rogov: "…estis ankaŭ homoj, kiuj tute ne volis ekparoli la lingvon"; L.Novikova: "...oni tro kuraĝe krokodilis..."; B.Tokarev: "La turista gvidanto ne nepre posedu Esperanton."

La lasta propono de famega esperantisto, elstara E-aŭtoro ktp, ktp min multe mirigis, ja temo de la diskuto estis PP, paroliga periodo, tempo dum kiu komencantoj devas ekparoli Esperanton! Sed la propono tuj ricevis reziston:

G.Cejtin: "Mi kontraŭas. En la grupo estu komuna lingvo."

№ 3(36), 1976/77

SEJT-18: notoj pri nuancoj…, V.Ĉernov: "Pri nia prononco. D i a b l o, k r o k o d i l o … estas sufiĉe popularaj vortoj. Tamen eĉ multaj spertuloj prononcas ilin nekorekte."

Vintre dormas nur ursoj, D.Mametova: "'7 verdaj ordonoj' malpermesas paroli nacilingve distance je 100 km de la klubejo…" [pri la vivo en Tjumena E-klubo "Revo"]

№ 11(44), 1976/77

Prepari komencantojn por la tendaro, V.Ŝilas: "Ankaŭ dum la marŝado mem necesas instigi uzadon de Esperanto".

№ 2(46), 1977/78

Malparoliga periodo, V.Ebel [eksa redaktoro de "Aktuale"]: "Unue. […] La tritagan marŝadon [temas pri Paroliga periodo] oni povas nomi kiel ajn: marŝiga periodo, anekdota, krokodiliga … nur ne paroliga. Apenaŭ en 3 grupoj (el 8!) okazis ĉiutaga E-instruado […] se miaj samurbaj komencantoj antaŭ PP iom stumblante demandis: 'Kiel tion diri en Esperanto?', do post la 3-taga 'paroligo' ili tiun demandon jam formulis en perfekta rusa lingvo aŭ… tute ne faris ĝin. […] Dua kialo. […] rajtas krokodili nur instruisto, nur dum instruhoroj. […] Trie. […] du trionoj da komencantoj, krom la lagon, manĝejon kaj alian ejon, jam nenion plu vizitis. [...] Kvare. […] Rezulte en OrSEJT el 126 personoj apenaŭ 30 povis paroli bone. […] el tiuj 30 ne ĉiuj gardis la lingvan disciplinon." [La nebona situacio en OrSEJT okazis post kiam] "Pluraj aktivuloj preferis veturi Poltavon al la konferenca tendaro (nobla strebo), sed komencantojn sendis al Miass: paroliĝu ili! [Ĉu vi rimarkis ion konatan? Jen estas realigo de la propono de A.Gonĉarov (v. № 7(11), 1974). Sed V.Ebel ne nur riproĉas, sed ankaŭ proponas] ne limigi la kvanton de komencantoj, sed ne akcepti al la tendaro tiujn homojn, kiuj en pasintaj tendaroj neglektis la disciplinon, kaj severe rilati al la fuŝrekomendoj."

№ 5(49), 1977/78

Informilo №1 (OrSEJT-20): "Personoj, montrontoj sin maldilegentaj dum la Paroliga periodo, kaj personoj neglektantaj la tendaran kaj lingvan disciplinojn estos eksigataj el la tendaro."

№ 7(51), 1977/78

Komitatanoj kunvenis en Moskvo, V.Aroloviĉ [tiama redaktoro de "Aktuale" kaj vicprezidanto de SEJM]: "La Komitato […] ne kontraŭas, ke ĝi [OkSEJT] pasu sen Paroliga periodo."

Nu jen, unu kapdoloro for. Ĉu post sekva letero de V.Ebel la SEJM-komitatanoj ne

kontraŭos, ke ĝi (OkSEJT) estu tute sen lingva disciplino?

№ 8(52), 1977/78

Plensukcesigi niajn amasajn aranĝojn (responde al V.Ebel kaj V.Vjazovcev), L.Novikova [tiama vicprezidanto de SEJM pri renkontiĝoj]: "Pri abundeco de 'krokodiloj'. […] Necesas verŝajne fiksi optimuman proporcion inter diversnivelaj tendaranoj kaj firme sekvi ĝin" [Ĉu vi rememoras en № 9(13) **Pri rajto partopreni tendarojn**, B.Anoĥin?]

Progresantoj en tendaro, A.Gonĉarov: "Pri krokodilado. Pravas k-do Vjazovcev […], ke 'krokodiloj' ne devas esti en la tendaro. En antaŭaj tendaroj oni batalis kontraŭ krokodilintoj duonŝerce-duonserioze. En ĉi-jara tendaro ni severigos la batalon."



№ 10(54), 1977/78

Ni ne perdu la esperantistan etoson, B.Granat: "…mi partoprenis vican CRRER-17. […] Sed la lingva nivelo de la renkontiĝo estis tre malalta. Terure krokodilis ne nur komencantoj, sed spertaj esperantistoj, kiujn mi memoras bone paroli en OkSEJT-19. [B.Granat kiel unu el la kaŭzoj de la krokodilado opinias manko de esperanteco dum CRRER kaj similaj renkontiĝoj.] ... dum OkSEJT-19, kie oni parolis pri Esperanto pli multe ol pri aliaj aferoj, la lingva nivelo estis multe pli alta (kvankam ankaŭ tie svarmis 'krokodiloj')."

№ 2(56), 1978/79

Analizante la someron, S.Smetanina: "Ĝenerale, la lingva nivelo de la tendaranoj estis sufiĉe alta kompare kun kelkaj pasintaj tendaroj. […] Malmulteco de 'krokodiloj' estas tre enviinda fakto por multaj E-aranĝoj. Ni ne povas diri, ke ili tute ne ekzistis, sed aroga krokodilado (kiel en Tiĥvin aŭ Poltava) tute ne sonis." [Certe bona atingo, sed] "El 120 tendaranoj estis nur 30 komencintoj. […] Se estus pli ol 40-50 komencintoj, la Paroliga kurso, kia ĝi estis ĉi-foje, estus malpli efika."

№ 6(60), 1978/79

Informilo №1 (OrSEJT-21): "5. Partoprenantoj. La paroligan periodon kaj la tendaron rajtas partopreni ĉiuj sovetaj esperantistoj, kiuj konsentos obei la tendaran disciplinon kaj tagordon."

Jes, venis! La organizantoj jam forgesis tiun gravan vorton "lingva", parolante pri disciplino. Komparu ekz. №5(49) ***Informilo №1 (OrSEJT-20).***

Информационный бюллетень АСЭ № 1(2), 1980

Встречи эсперантистов: "За пять дней до начала лагеря была организована разговорная практика для начинающих эсперантистов." [Temas pri OrSEJT-21.]

№ 2(63), 1981/82

Pensoj pri OrSEJT-23, A.Peĉonkin: "Citaĵoj de la verda policestro estis ridindaj bagatelaĵoj kompare kun tio, kio sonis en kaŝitaj anguletoj kaj keloj. Neniu hontis krokodiladon, kiu aŭdiĝis abunde kaj diverslingve. La lingva disciplino konfirmis al tiu en ĝenerala senco […] Lastan tempon aperis tendenco (ekzemple en teatraĵoj) prezenti plejparte abstraktaĵojn aŭ montri pantomimojn."

REVU-22, A.Korĵenkov: “Matene la 16-an de oktobro okazis inaŭguro, pasinta en la pura rusa lingvo […] Sekvis skizo de B.G.Kolker pri historio de REVU-oj, ruslingva varianto de la fama deklaro de Pastuĥov, kiu antaŭnelonge aperis en ‘Hungara vivo’.”
Seminario de la klubestroj, S.G.: “Restis nur bedaŭri, ke la seminario pasis ne en E-o. [Interese, en kiu lingvo estis la seminario? Tamen jen aludo] Dum la kunsidoj estis aŭskultitaj paroladoj de: respondeca sekretario de ASE Berjoza A.V. [kaj aliaj]”.

Tamen pri la lastaj du aranĝoj ne necesas tro mediti, ĉar la lasta estis tute oficiala kun ŝtata subteno kaj la antaŭlasta duonoficiala: ĝuste dum inaŭguro ĉeestis reprezentantoj de oficialaj organoj (ekz. la fakestro de la Baŝkiria RK de VLKSM G.Faizov).

Информационный бюллетень АСЭ № 6(72), 1989


UNIO DE SOVETAJ SOCIETOJ DE AMIKECO KAJ KULTURAJ LIGOJ KUN EKSTERAJ LANDOJ
Москва, К-9, пр. Калинина, 14
Soveta Unio, MOSKVO, K-9 prosp. Kalinina 14
„16" XI 76 197 г.
№ 06/634
Уважаемый тов. Рогов А.Б.!
В связи с Вашим письмом, дату которого Вы к сожалению не указали, сообщаем, что заметка о которой Вы пишете в письме не нуждается, на наш взгляд, в каких-либо комментариях.
С уважением,
Ответственный секретарь
А.Береза

ruslingva rezolucio de Berjoza sur esperantlingva blanketo

А у нас… А у вас…, А.Шляфер: “Некоторые наши проблемы вообще остаются загадкой для зарубежных коллег. […] почему в качестве официальных представителей АСЭ выступают, как правило, люди не только некомпетентные, но и просто не владеющие эсперанто и неполномочные что-либо решать? (Многие искренне удивлялись, видя, что в СССР имеются образованные, профессионально подготовленные, инициативные эсперантисты.)”

Informilo de MAJE [Moskva Asocio Junulara Esperantista] [plue IM] № 7-8(10-11), 1989
Rememoroj pri OkSEJT-30, A.Liskov: “Kiel kutime jam en unua nokto sonis niaj plej belaj kantoj, poste sekvis malpli belaj, tamen niaj, kaj finfine – ne niaj – ruslingvaj.”

Jen estas respeguliĝo de grava, sed ĉu bona, tradicio de niaj SEJT-oj – post certa tempo (0-a horo, 1-a horo de nokto) oni rajtas krokodili.
Seminario de tradukistoj, V.Melnikov: “Kvankam signifa parto de ĉeestantoj estis komencantoj, […] la lingva nivelo estis alta.” [Sed denove] “… ĝin partoprenis ĉ.30 personoj…”

Jen estas magia kvanto de esperantistoj: se kvanto de partoprenantoj estas pli ol 30-40, do ili iĝas krokodiloj.

Eksciu, ke… [plue Ek] № 16, 1990
Ni konu iliajn nomojn, D.Cibulevskij: “Fondendas tiaspeca rubriko kun indiko de malesperantistoj. […] venis al OkSEJT-31 ne por perfektigi la lingvon, sed nur por propagandi sian “Teorion de feliĉo” (ruslingve) [...] ĉu necesas lin akcepti al pluraj E-tendaroj, renkontiĝoj?”

Jen bona kaj certe senerara eblo altigi lingvan disciplinon. Aŭ aparta tendaro por neparolantoj aŭ ne permesi kaj punktofino!

IM № 1(12), 1990
Renkontiĝo en Toljatti, S.Starŝov: “Evidentiĝis, ke E-o ne estas sola laborlingvo de la renkontiĝo: ofte aŭdeblis dialogoj en la franca kaj germana lingvoj, kaj certe en la rusa.[kaj ĝuste post tiaj vortoj sekvas konkludo] Unuvorte la renkontiĝo pasis bone.”

Jen estas la unuaj trajtoj de novaj tempoj: oni komencas "aligatori".

Moskva Gazeto [plue MG] № 2, 1990

Tendara somero, G.Kokolija: "2. InterSEJT-90. […] Tamen, necesas diri, ke amasa ĉeesto de alilandanoj evidentigis kelkajn tradiciajn aranĝojn preskaŭ senutilaj. Ĉi tion montras ekzemple 'verda polico', malgraŭ, ke ĝin brile provis savi Miŝa Lineckij. Ankaŭ tradiciaj lignofajroj ne vokis vastan intereson. Sed partopreno de alilandanoj ankaŭ alportos novajn trajtojn, kiuj eble rekompensos la perdon."

*Jen bona atesto pri ideo de lingvo **internacia**, kiu aktive rolas dum **internaciaj** renkontiĝoj.*

La 9-a Volgia Esperanto-Renkontiĝo, A.Ananjin: "La fenomeno de A.Bondarj estas pensiga kaj eble eĉ karakteriza. […] dum lastaj 2 jaroj li tute ne partoprenis la agadon de la klubo – kaj jen li revenis en tute nova aspekto – jam kiel atendita kaj fervora esperantisto. Li ŝajnis sola homo en VER, kiu konstante emis paroli en Esperanto. Nevole aperis penso – ĉu por iĝi serioza esperantisto necesas por kelka tempo distanciĝi de nia malenua movado?"

A.Ananjin unuan fojon vaste prezentis delonge vagantan ideon: ĉefa malhelpilo por praktiki E-on estas E-klubo. Paradokso, sed certe havanta sencon.

OkSEJT-27: surkoligo de krokodilo dum matena kunveno

MG № 2(4), 1991

La lamentoj pri EoLA (de kunorganizinto kaj grizharbarba spertulo), A.Ananjin: "a) progresas nova-malnova skismo: 'la elito' […] kaj la 'amaso' – simpatiaj kaj gajaj geknaboj, iam eĉ scipovantaj E-on, sed ne uzantaj ĝin por la dumrenkontiĝa 'societumado'. [Kaj jen ni fin-fine renkontas mencion pri kerno de ŜĈKĤLando] Estis videblaj ankaŭ volĵskijanoj kun niĵnij-novgorodanoj (sed, dio mia, kiom ili krokodilis!)"

MG № 4(6), 1991

OkSEJT-32, A.Blinov: "Laŭ mi, la tendaro estis sukcesa kaj la plej grava atingo estis la relative alta nivelo de la lingvo kompare al la antaŭaj junularaj aranĝoj (eĉ volĵskij-anoj ĉifoje estis malpli krokodilemaj ol kutime). Kial? Ĉar spertuloj pli multis ol novuloj. […] Ĉi-tendare estis lanĉita la konkurso pri malkrokodilado. Ĉu ĝi indas plu esti?"

Certe indas. Dum la 90-aj jaroj estis inventitaj kelkaj belaj kaj bonaj tendaraj tradicioj (ekz. "Kuru-kuru") kaj inter ili Malkrokodilaj konkursoj estas vera perlo.

MG № 5(7), 1991

Pri GELERT-3, A.Gammer: "Miaopinie, esperantiste la aranĝo ne estis altkvalita, ĉar spertaj esperantistoj ne multnombris, kaj estis multaj homoj, kiuj la unuan fojon ekaŭdis pri Esperanto nur trafinte al la renkontiĝo."

Jen estas radikoj de (ĉu fi-) fama tradicio inviti al E-tendaroj neesperantistojn. Dum la sekva jardeko ĝi evoluos kaj apogeos dum OkSEJT-oj 39 kaj 40.

P.Fiŝo (Koroljov)

(daŭrigota)

KONFESO DE MUZIKISTO

La grupo "Sakura" ricevis dum EoLA-14 la premion "pro la plej bona koncerto".

1. Antaŭ

Do, mi komencas.

Komence estis Dio. Dio kreis Teron. Tero kreis nin. Ni kreis la grupon "Sakura". Kreis en Krasnojarsk, sur la bordoj de neglaciiĝanta en nia urbo rivero Jenisej, antaŭ unu jaro.

La fundamenton de tiu ĉi japannomita kreaĵo konsistigis triopo de profesiaj kantistinoj, el kiuj en Esperantujo antaŭe estis konata nur Evelina Sokolova. Instrumentistoj de "Sakura" estas ĉefe muzikistoj de la projekto "La Dua Atento" (Второе Внимание), el kiuj esperantistoj konas nur Sergeon Bozin. En plena konsisto (naŭ muzikistoj) la grupo proksimume dum unu jaro koncertis en Krasnojarsk kaj estis laŭreato de la urba Festivalo…

En la plenumo de "Sakura" oni povas aŭdi muzikon de popoloj de la tuta mondo en polifonia sonado. La muziko iutempe povas esti komplika, poste – simpla kaj ritma, sed ĉiam belega kaj interesa. La ĉefa komponisto de la grupo – Lena Ŝĉapova – estas vera Majstro je Majusklo.

"Japana kanto" de la muzikgrupo "Sakura"

La programo, kiun ni prezentis dum EoLA-14, konsistis ĉefe el tradukitaj en Esperanton voĉkomponaĵoj de Lena kaj aranĝaĵoj de kantoj kaj komponoj de Sergeo. Evelina estis la organiza centro (koro) de nia teamo, kaj Alla kun Nastja – ĝia animo, korpo, manoj, piedoj, voĉoj, okuloj kaj oreloj. Ĉar plimulto de niaj muzikistoj ne sukcesis partopreni la renkontiĝon, niaj kantistinoj estis devigitaj preni en la manojn la muzikilojn, por sia granda plezuro.

Sur la ĉeboksara sceno ni aperis en jena konsisto: Lena Ŝĉapova – kantado; Nastja Agapova – kantado; Evelina Sokolova – kantado, gitaro, metalofono; Alla Jaĥina – deklamado de versaĵoj, perkutinstrumentoj; Olja Kuleŝova – dancoj; Sergeo Bozin – kantado, gitaro, fluto, lipharmoniko, bongoj.

Pro tio, ke unu el niaj komponistoj – Lena – loĝas nun en Niĵnij Novgorod, inter la du urboj kutimiĝis aktiva poŝt- kaj interret-komunikado. Lena sendis al ni la notojn de siaj melodioj kaj aranĝaĵoj, kaj ni al ŝi – la tekstojn. Rezulte dum du-tri monatoj ni formis la programon, kiun poste prezentis en EoLA. Se diri pri miaj kantoj kaj komponaĵoj – duono estis verkita antaŭe kaj duonon mi (fin)verkis dum tiuj ĉi du-tri preparmonatoj. Ekzemple, la kanto "Menuet'", iĝinta vera himno de EoLA-14, ankoraŭ decembre sonis dum koncertoj de la projekto "La Dua Atento" kiel instrumentaĵo, en kiu mi komence gitarludis la ĉefan melodion, poste longe improvizis kaj fine denove revenis al la ĉefa temo. La muziko ekplaĉis al Nastja kaj Evelina kaj ni transskribis la melodion al oportuna por iliaj voĉoj tonalo, verkis la tekston kaj dediĉis ĝin al Renesanco – la ĉefa temo de EoLA.

… Finfine ni koncertis en la klubo. Tio ĉi estis vera evento en la vivo de Krasnojarska E-klubo (kiu estis filmita kaj post du tagoj prezentita de unu el la popularaj urbaj TV-kanaloj "TVK"). Io estis bona, io – ne tre, sed la aŭskultantoj restis kontentaj kaj petis nin kanti ankoraŭ kaj ankoraŭ, ĝis nia plena elĉerpiĝo…

2. Dum

28.02.02

… Do, ni alvenis la bazejon "Ĉajka", lokiĝis, registriĝis… tagmanĝis, etosiĝis kaj finfine, post longa disiĝo, renkontis Lena-n, kiu ĵus venis el Niĵnij Novgorod. Post longdaŭra interkisado, dum la tea ceremonio, ni ĝojigis ŝin, ke samtage vespere ni jam partoprenos en la Barda kafejo koncerton, kiu nomiĝas "Sergeo Bozin kun geamikoj".

… La unuan parton de la koncerto mi kantis sola, unu kanton – "Cim'" – kun Griŝa Arosev, kaj la duan parton – kun Nastja, Lena kaj Evelina. Al ni kaj aŭskultantoj ĉi-tage tre plaĉis "Japana kanto", kiun Lena ie elfosis kaj aranĝis por nia grupo (ŝi diris, ke la kanto aĝas jam tricent jarojn). Mi ĉi-kante inspire ludis bongojn (etaj tamburoj). La "Japana kanto" estis nia "vizitkarteto" dum EoLA. Ni prezentis ĝin minimume trifoje kaj poste, kiam ni kun la novosibirskanoj veturis hejmen, la junulinoj reeĥigis la festivalon (aŭ incitis nin), kantante "jo jo jo, jo jo jo" (komenco de la kanto). Dum la koncerto mi ludis la muzikaĵon "Plena luno", kiun mi komponis rigardante al la plena luno, akompaninta nian vojaĝon de Krasnojarsk ĝis Ĉeboksari. Ĝi estis mia freŝa komponaĵo kaj mi precipe ŝatis, eĉ amis ĝin.

Por komponisto liaj kreaĵoj estas kiel infanoj por gepatroj. Estas interese, ke akto de muzikkreado similas al akto de infankreado. Komence la artisto vivas trankvile, poste lin turmentas malklara antaŭsento de io, la antaŭsento transformiĝas al klara sento, la sento trovas konkretan formon kaj komenciĝas la akto, la akto plene absorbas lin, li jam nenion vidas ĉirkaŭe, nenion aŭdas krom lia akto, la akto de kreado, li eĉ ne povas halti, li estos lasta fiulo, se haltos… La akto estas finita. Li sentas sin malpleniĝinta kaj malforta. Sed tio ĉi estas la agrabla malforteco. Lia forto transiris al lia kreaĵo. Lia amata kreaĵo. … Pasos tempo kaj ĝi kun (aŭ sen) lia helpo plifortiĝos kaj ekfloros kiel belega floro, je ĝojo de li kaj ĉiuj. Bedaŭrinde ne ĉiuj kreaĵoj atingas maturecon, ofte okazas abortaĵoj. Estas interese, se la leĝo pri malpermeso de abortoj estus universala, ĉu nia mondo estus plena de genioj kaj belulinoj, aŭ de teruraj monstroj kaj idiotoj?

… Nu, mi iom deflankiĝis. Mi ne diros al vi pri ĉiu nia kanto kaj komponaĵo. Vi jam komprenis, ke ĉiu havas longan kaj interesan historion.

01.03.02

Tiu ĉi tago estis sendube la plej streĉa por mi kaj "Sakura". Mi vekiĝis je la sepa kun granda deziro provludi la programon por majstra klaso, kiun mi nomis "Epoko de renesanco de gitaro". Muziko estas la tria lingvo, kiun mi praktikas lastatempe (krom la rusa kaj Esperanto), la lingvo, pere de kiu mi interrilatas kun homoj, la propra animo kaj Dio. La lingvo superabstrakta, superuniversala kaj eterna…

Enkadre de la majstra klaso mi konatigis la esperantistojn kun muziko kiel fenomeno, parolante gitare kaj Esperante. Mi parolis pri muziko de diversaj direktoj (klasika, "kantri", flamenko, bluso, ĵazo…) kaj praktike prezentis, kiel mikso de ĉi stiloj, la specifaj teknikoj kaj aplikaturoj povas garantii al gitaristoj vere senlimajn esprimplenajn eblojn, kaj nuntempe Gitaro kiel muzikilo travivas la veran Epokon de Renesanco.

Tiuj du matenaj koncertoj-lecionoj por mi estis ne malpli, sed eĉ pli gravaj ol la vesperaj koncertoj. Mi gitarimprovizis, kantis, kun mi kantis kaj gitarludis Griŝa kaj Evelina. Poste la aŭskultantoj demandis min pri ĵazaj aplikaturoj de akordoj, senco de muziko por mi, energipotencialo de muzikisto… Rezultis tre interesa konversacio.

… Provludo antaŭ nia vespera koncerto. En la rolo de dancistino – Olja Kuleŝova el Ivanovo (mi jam la duan fojon invitas ŝin, unuafoje – por simila koncerto dum OkSEJT apud Ivanovo en 2000; Olja bone sentas muzikon kaj ŝiaj movoj konsistigas kun ĝi agrablan unuecon)… Kaj jen finfine komenciĝis vespera koncerto de la grupo "Sakura" – la evento, por kiu ni kolektiĝis ĉi tie el tri urboj kaj al kiu konkrete prepariĝis dum du lastaj monatoj…

La spektantoj (kaj aŭskultantoj) vidis (kaj aŭdis) koncerton, kiu ne similis kutiman bardan koncerton, kie ĉiu kanto konsistas el strofoj kaj refrenoj kun la sama muziko.

Kontraŭe. Ĉiu numero estis laŭsie originala. En la komponaĵoj de Lena voĉoj de la kantistinoj sonis malsame en diversaj strofoj. Ĉiu strofo de la kanto en ŝia aranĝaĵo sonis kiel aparta komponaĵo, ne rompante la kanton entute. Miaj muzikaĵoj abundis je improvizoj. Kelkfoje la sceno vigliĝis per movoj de la dancistino… sonis versoj… la okulojn de la muzikistoj ekkovris nigraj okulvitroj ("La tutan semajnon bluso")… Kiam ni kantis la finan (el la planitaj) kanton – "Menuet'" – oni kunkantis al ni el la halo: "Renesanc', renesanc'"… Kelkajn kantojn ni ripetis bise. … Multe da feliĉaj, ĝojaj vizaĝoj, da bonaj, varmaj vortoj – jen estas vera rekompenco por muzikisto (kvankam ankaŭ la "malveran" ni ne rifuzis).

… Do, kio malbonas? Bedaŭrinde, kiel estas kutime dum EoLA-j, estis malbona, pli ĝuste nenia, sono en la sceno. Teknika organizo de koncerto estas sama kiel tiu de diskoteko. Sed dum EoLA kvazaŭ neniu estis surscene, neniu kun oreloj, sed se kun oreloj – tiuj ne estas oreloj, sed – maloreloj. Kreiĝas impreso, ke ni tute ne zorgas pri kvalito de la surscenaj aranĝoj. Tio ĉi signifas, ke neniu zorgas pri kvalito de EoLA, transformiĝinta al simpla granda "tusovka", mi petas pardoni min pri la esprimo – esperantista "tusovka".

… Kaj oni ankoraŭ miras: pro kio esperantistoj-muzikistoj tiel timas la mikrofonon, pro kio surscene havas tro malĝojajn vizaĝojn? Mi povas aserti, ke unu el la kaŭzoj de malalta muzikaktiveco de esperantistoj kaj relative malalta nivelo de koncertoj estas tradicie plena malesto de organizado de surscena sono. Mi klarigu. Estas sono en la halo, estas sono sur la sceno. Povas esti tre bona sonado en la halo, sed samtempe tre malbona surscene. La aŭskultantoj povas ĝui, sed la muzikistoj – turmentiĝi. Dum bone organizitaj koncertoj unu parto de sonaparataro estas direktita al la halo, sed la alia – al la sceno. La aparataro, direktita al la muzikistoj (monitoroj), devas estis agordita disde la hala. Kiam muzikisto koncertas sur bone sonigita sceno kaj ĝuas propran sonadon, li kantas (kaj ludas) eĉ pli bone ol sen la aparataro, kaj se li ankaŭ vidas kaj aŭdas la subtenon de halo, li sentas grandegan inspiron kaj rezultas la koncertoj, kiujn ni, esperantistoj, bedaŭrinde neniam aŭdis. Kaj se tamen iam ni aŭdis bonajn koncertojn, la muzikistoj eĉ tiam estis devigitaj imagi propran bonan sonadon, ne aŭdante ĝin. Tio ĉi estas vera … (nomu mem, mi konfuziĝas).

Ĉu ne estas bonaj muzikistoj kaj kantistoj inter ni? – Estas, sed iuj preferas kanti eĉ tutan nokton enĉambre, sed ne surscene, aliaj – scias, ke sono dum EoLA ĉiam estas aĉa kaj tute ne vizitas ĝin. Organizantoj kutime ŝparas monon kaj invitas sonreĝisorojn sen sperto de sonigo de koncertoj kaj nur kun hala aparataro (sen monitoroj). Rezulte ni havas, kion havas.

Dum la pasinta EoLA estis nur du enhalaj koncertoj. Ĉi-foje ni ŝtopis la embrazuron per niaj korpoj kaj per korpoj de niaj geamikoj. Kiu sekvos?

02.03.02

Matene mi gvidis la duan majstran klason, dediĉitan al ĵaza gitaro – vere neelĉerpebla temo…

… aliris Kristian el Francio kaj invitis min al sia koncerto de franca romanco. Kristian kantis proprajn kantojn france kaj gitarakompanis. Simple kaj "bonguste", tio memorigis la kantojn de Ĝo Dassen… Estas originalaj muzikideoj, voĉimprovizo… Oni petis lin – "kantu la kantojn de Ĝo Dassen". Kristian pardonpetis kaj diris, ke li kantas nur proprajn kantojn.

Vespere estis la koncerto de Griŝa Arosev kaj Lena Katajeva (komence kunkantis Jura Karcev). La koncerto estis bona.

03.03.02

… Al mi neatendinte venis Olja Ivannikova (Ĉeboksari) kaj proponis gitarakompani ŝian deklamadon de la versaĵo de Nikolaj Gumiljov "Ĝirafo" dum la koncerto… Rezultiĝis interesa programero. Dum ĉi koncerto la grupo "Sakura" kantis "Menuet'". Nastja superis sin

kaj kantis simple belege, eĉ frenezige. Bone kantis Saŝa Ĥrustaljov (Dimitrovgrad), Sonja Ŝejnina (Ivanovo), Elvira Nizamieva (Novosibirsk), Tanja Volodina (Volgograd)…

Sergeo, Evelina kaj Kristian en Krasnojarska E-klubo

3. Post

Poste ni dum kvar tagnoktoj veturis hejmen. En Kazanj dum trajnŝanĝo ni renkontis la novosibirskaninojn kaj Kristian, kaj baldaŭ ni jam kun li kantis en la stacidomo malgraŭ ke estis nokto.

Dum la fervojveturado ni ankoraŭ kantis kun Kristian, kaj kiam ni kune koncertis en la Krasnojarska klubo, ni jam konis liajn kantojn, kaj li – la niajn. Dum tiu koncerto al ni aliĝis ankaŭ nia perkutisto Ĵenja Bermud (Oberenko), kiu ne sukcesis viziti EoLA-n…

Nu, sufiĉas, mi jam laciĝis skribi.

vere via Sergeo Bozin (Krasnojarsk)

REEĤO

La 11-an de aprilo dum nia klubkunveno en "Lev Tolstoj" estis pridiskutata praktika apliko de Esperanto. La kunvenintoj multe parolis pri Esperanto en komerco, turismo kaj kantosurbendigo, en lernejoj kaj firmaoj. Sonis vortoj, ke en Esperanto-kluboj oni konversacias kaj ĝuas lukson de Esperanto-etoso por sekvatage reveni al sia kutima vivo, kie necesas paroli en la rusa aŭ en la angla, kaj forgesi pri Esperanto. Mi ne konsentas. Esperanto havas celon kunigi homojn por plibonigi ilian vivon. Tamen vivi pli bone endas ne nur en ia fora estonto, sed ankaŭ nun, hodiaŭ, ĉi-momente, kaj Esperanto tion ebligas! Ja neniu venas Esperanto-klubon piede, ĉiuj veturas, kaj preskaŭ ĉiuj – de malproksime – por kio? Aperas novaj kaj novaj lernantoj kaj klubanoj – por kio? Nun ankaŭ sen Esperanto eblas vojaĝi eksterlanden kaj renkontiĝi tie kun interesaj homoj, ankaŭ sen Esperanto oni faras bonan karieron, kaj tamen Esperanto vivas – por kio? Verŝajne Esperanto donas, jam donas tion, kio faras la vivon pli bona. Ĉu tio ne estas la vera praktika apliko de Esperanto, kaj ĉe ni, kaj eksterlande? Eblas oponi, ke tia Esperanto funkcias kiel puntotrikado, fiŝkaptado kaj aliaj hobioj, sen kiuj la vivo estas malplena. Se jes, kio do ĉagrena? Tute ne ĉiuj volas, povas kaj kapablas ĝui, ekzemple, pentradon aŭ sporton, kaj ni ĝoju, ke ankaŭ Esperanto faras multajn vivojn pli bonaj, ĝuste tiel efektivigante sian ĉefan revon! Se praktika apliko de Esperanto nepre devas esti kunligita kun monakirado, kiu scias, kiom da mono ni estus devigitaj elspezi aŭ forĵeti sen viviga akvo de Esperanto. Ja monon oni akiras ne nur perlaborante, sed ankaŭ ŝparante! Kaj se en lernejoj kaj firmaoj Esperanto dume ne trovas sian lokon, tio ne signifas, ke ĝi ne estas praktike aplikata. Ĉi-rilate Esperanto evoluas, eble, same iom-post-iome kaj sendepende, kiel ankaŭ rilate al siaj vortprovizo kaj gramatikaĵoj – ĉu indas perforte rapidigi tiun ĉi proceson? Pasu ĝi nature.

Se iuj renkontiĝintoj parolas en Esperanto, ili praktike aplikas ĝin. Subtenante ĝian vivon kaj plibeligante la propran. Alikaze ili parolus en la gepatra lingvo.

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

Bulteno de REU

DECIDO DE REU-ESTRARO

REU-Estraro per retpoŝta voĉdonado en aprilo 2002 decidis elekti Miĥail Ĉertilov kiel REU-Komisiiton pri financaj aferoj.

HORO DE ESPERANTISTA SOLIDARECO

Dum la Vladimira "Vojaĝo al infaneco" la unuan fojon ni eksperimentis la novan programeron – "Horo de letero", kiu, laŭ mia pritakso, pasis sukcese kaj kiun indus fari tradicia en ĉiuj niaj E-aranĝoj, unuavice tutlandaj (OkSEJT, RET kaj REK).

Ofte ni renkontas en revuoj kaj Interreto korespondpetojn, inkluzive de komencantaj esperantistoj, inkluzive de tiuj el "ekster-Esperantujaj" landoj. Nia plej maksimuma reago: "Eh, nemalbonus subteni!" Sed kiu vere faras tion? Kiu en nuna tempo emas letere korespondi kun nekonatoj, komencantoj? Mi supozas, ke treege malmultaj, por ne diri: "Neniu". Nun ne estas mode leteri perskribile... Kaj la homoj restas sen subteno. Eble, eĉ sen pruvo, ke ie sur la planedo ekzistas iuj, kiuj samkiel ili lernas Esperanton aŭ eĉ posedas ĝin. Kaj la homoj foriras – eble, eĉ kun bedaŭro, ke ili trompiĝis, elspezis la tempon vane... Nia esperantista konscio devus suflori al ni, ke necesus helpi al tiuj homoj minimume fiksi pozitivan impreson pri la afero, montrante, ke en siaj streboj ili ne estas solaj.

solena enkestigo de la leteroj

Ne nepras eĉ proponi korespondadon – se ni ne emas korespondi. Sed sendi simplan salutkarton estas tute nemalfacile. Des pli, kiam ni kune skribas, kaj estas spertuloj, kiuj zorgas pri gramatika korekteco, kaj estas komuna etoso, kaj estas komuna kompreno, ke per tiu kunago ni subtenas la samideanojn kaj identigas nin kun la monda esperantistaro. Tre malmultaj similcelaj aranĝoj estas en nia Esperantujo, ĉu ne?

Se la organizantoj de E-aranĝoj ekkonscias tion – ĉio cetera tre simplas. Necesas por 40 minutoj kunvenigi partoprenantojn, konsciigi ilin pri la graveco de la afero, disdoni la adresojn kaj la bildkartojn (anticipe aĉetitajn), skribigi mallongajn saluttekstojn, viziti poŝtejon kaj tuj sendi la bildkartojn. Ĉio!

En Vladimir la aranĝon partoprenis pli ol 20 homoj, kiuj spontane disdividiĝis je grupoj po 3 personoj (lingva spertulo, skribisto, verkisto aŭ simile), ĉiu grupo ricevis po unu adreso de irana komencantino kaj po unu bildkarto pri Vladimir. Ĉe la finskribo Oĉjo Dadaev kontrolis ĉies tekstojn. Ni detale kaj multfoje klarigis, kiel necesas surskribi adresojn. Fine de la laboro 3 grupoj laŭdezire prezentis siajn tekstojn (ili evidentiĝis tre ĉarmaj). Kelkaj homoj subskribis la tekstojn sianome kaj eĉ esprimis la deziron plu korespondi. Poste, dumvoje al la Planetario, ni kune vizitis poŝtejon, afrankis ĉiujn bildkartojn

kaj solene enkestigis ilin. Ni ĉiuj estis tre kontentaj – ĉar la afero estis plenfarita de la komenco ĝis la fino.

El tiu agado povus elkreski plia konscio pri SIA (Semajno de Internacia Amikeco) kaj sperto organizi aranĝojn en ties kadroj. Cetere, estas nemalbona programero ankaŭ por iu kluba kunveno, ĉu ne? Do, ek, karaj samideanoj!

kore kaj kunlabore – Irina Gonĉarova (Odincovo)

EVITI DUOBLAN MEMBRECON

En REGo № 2(9) aperis listo de novaj aliĝintoj al REU. Estas gratulinda la fakto, ke plejmulto de la aliĝintaj kolektivoj estas prezentita ne per anonimaj membronombroj, sed per personaj listoj – tio ebligas pli bone kaj pli konkrete vidi nian realan potencialon.

Tamen atentema leganto povas rimarki, ke pluraj personoj aperas en la listo dufoje – kiel individuaj kaj kiel aligitaj membroj. Certe, tiuj homoj meritas nian estimon, ĉar ili fakte pagis al REU du kotizojn: memstare kaj pere de la klubo, montrante tiamaniere sian duoblan fidon al REU. Sed la fakto havas ankaŭ aliajn dimensiojn.

Niaj Statuto kaj Ĝenerala Regularo rajtigas esperantistojn elekti la manieron de aparteno al REU: oni povas esti ĉu individua membro (IM), ĉu aligita/asociita membro (AM). Elekti, sed ne kombini ambaŭ manierojn!

Fakte, por tiu, kiu jam aliĝis kiel IM, estas nenia pragmatisma rezono registriĝi ankoraŭ kiel AM, ĉar la amplekso de rajtoj, servoj ktp, kiujn oni ĝuas estante IM, plene kovras tiun de AM. Kaj se oni deziras pagi al REU plian monon – tion ja eblas fari donace.

La 6-an de majo en la familio de Nataŝa kaj Andrej Grigorjevskij naskiĝis filo Aleksandr. Ĉiuj esperantistoj en Ŝumerlja estas feliĉaj! Ĉiuj esperantistoj en Ĉuvaŝio, en cetera Rusio, en la tuta mondo ĝojas kun ili! Gratulojn al Nataŝa, Andrej kaj Aleksandr en la nomo de REGo!

Pli gravas tamen, ke dufoja enlistigo de la samaj homoj dubigas pluajn statistikajn informojn pri REU: nun, renkontante raportajn aŭ artikolajn frazojn kun ciferoj, ekzemple: “REU unuigas 100 individuajn membrojn kaj 30 klubojn kun 200 aligitaj membroj, sume ni havas do 300 membrojn”, oni povos suspekti blufon kaj demandi: sed kiom el tiuj 300 estas kalkulitaj dufoje?

Plian strangaĵon, fontantan el duobla membreco, mi vidas en tio, ke tiaj REU-anoj ricevos po du membrokartojn; do ni ne miru, se iam iuj el la “duobluloj” pretendos la duan voĉon en la Konferenco! Kaj tiam estos tre malfacile eviti skandalon, kverelojn, kulpigojn pri fiintencoj: ja en lastatempaj elektadoj de REU-Prezidanto ĉiu voĉo ofte estis vere decida.

Do prefere ne krei danĝeran precedenton, sed agnoski kaj laŭeble korekti la mison, – kaj nepre ne ripeti ĝin estonte.

La koncepton de aligitaj membroj REU transprenis de UEA, kies Landa Asocio ĝi estas. Kaj UEA, statistikante aligitajn membrojn, ĉiam atentigas Landajn Asociojn: kalkulu kiel AM nur tiujn viajn membrojn, kiuj ne estas IM de UEA. La saman skemon devus apliki ankaŭ la Estraro de REU, alvokante la aliĝintajn kolektivojn sendi la kotizojn kaj konformajn listojn. Do kompilante la listojn de AM-oj, en la kluboj oni kontrolu, ke tien ne trafu IM-oj. (Krome necesas forfiltri geknabojn sub 18 jaroj: ĉu ili povas membri en la klubo, estas ties interna afero, sed por REU ekzistas la statuta aĝlimo.) Vere, por la klubaj estraroj estas iom da plia laboro – tamen kredeble negranda, se la enlistigatoj estas realaj, konstante kontaktataj klubanoj, sed ne “malvivaj animoj”. Cetere, tiel la aliĝintaj kolektivoj povos eĉ ŝpareti el la transsendataj kotizoj.

Eventuale atentinda kazo estas, se iu, jam registrita kiel AM, dezirus samjare aliĝi kiel IM. Evidente, ne indus diri al li: “ĉi-jare vi jam estas AM, do restu ĝis la jarfino en tiu kategorio, kaj sekvajare vi povos jam aliĝi kiel IM”. Pli prudente estus, kaj tio ne kontraŭus la Statuton nek la Ĝeneralan Regularon, reregistri la personon en la alia kategorio, samtempe

forstrekante en la malnova. Kaj kian kotizon de li preni: ĉu la plenan aŭ reduktitan, konsiderante lian jam pagitan AM-eron en la kluba kotizo – estas demando ŝajne ne principa kaj certe solvebla.

Viktor Aroloviĉ, Komisiito de REU (Moskvo)

La 23-an de aprilo en Sankt-Peterburga Domo de ĵurnalistoj okazis gazetara konferenco, dediĉita al ĉi-jara 110-jariĝo de Sankt-Peterburga E-societo "Espero". En la konferenco partoprenis la prezidanto de la Societo Anna Butkeviĉ (en la foto – maldekstre), konataj peterburgaj geesperantistoj Maria Aboljskaja, Valerija Cvetkova, Vladimir Kosarev, gasto el Moskvo Valentin Seguru, kiu reprezentis REU (en la foto – centre). Inter la ĵurnalistoj ĉeestis la reprezentantoj de la tagĵurnalo "Sankt-Peterburgaj informoj" ("Санкт-Петербургские ведомости"), ITAR-TASS, radio "Rossija", la gazeto "Anomalija", kaj ankaŭ la funkciulo de la Komitato pri kulturo de la urba Administracio.

RONDO FAMILIA

kio ĝi estas, kaj kiel vi povas subteni ĝin

En la vasta pejzaĝo de mallongigoj kaj de asocioj apud UEA kaj TEJO ekzistas ankaŭ "Rondo Familia". Ĝi celas kovri tiun aĝ-grupon, kiu entenas ĵus geedziĝintajn parojn kaj iliajn infanojn, ĝis la momento, kiam la infanoj kapablos mem veturi al TEJO-aranĝoj.

Ĝi registras familiojn, kiuj uzas Esperanton hejme kaj edukas siajn infanojn en Esperanto. Ĝi prizorgas aranĝadon kaj informadon pri pluraj kunvenoj por infanoj (kiel la Internacia Infana Kongreseto aŭ la Renkontiĝoj por Esperantlingvaj Familioj). Ĝi eldonas tre belan revueton, kies titolo estas "Familia Esperanto". Ĝi tenas la kunligojn kun la retlisto por familioj kaj kun la retpaĝoj por familioj kaj infanoj. De tempo al tempo ĝi eldonas aĵojn utilajn. La plej furora eldono estis "Hejma vortaro".

Ĉu, do, ĉio en ordo? Preskaŭ!

Mankas du ĉefaj aferoj, pri kiuj nur vi povas helpi, kaj neniu alia:

* sufiĉe da aliĝantoj. Ĝis nun nur 300 familioj estas registritaj kiel tiaj en la komputilo de CO de UEA. Se vi estas en familio, kiu uzas Esperanton, aŭ se vi konas tian familion, sendu la detalojn pri la familianoj al <uea.co.uea.org> por esti senpage registrata.

* sufiĉe da mono. La servoj de Rondo Familia estas principe senpagaj, sed bonhavaj familioj kaj mecenatoj devas pagi la kostojn de la revuo "Familia Esperanto" kaj aliajn malgrandajn administrajn kostojn. La konto de "Rondo Familia" ĉe UEA estas *idoj-p*.

Se vi volas korespondi pri ĝi kaj demandi pliajn informojn, bonvolu skribi al la kunordiganto de la UEA-Komitata komisiono pri Rondo Familia Amri Wandel laŭ la adreso <amri@frodo.fiz.huji.ac.il>.

Renato Corsetti (Italio)

NOVAJ REU-ALIĜOJ POR 2002

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Ĉeboksara E-klubo "Ĉielarko" (+ 3 novaj membroj, la plena listo: Andronnikova Nadeĵda, Artimuk Jelena, Basova Irina, Blinov Aleksandr, Blinova Julija, Ĥoĥlova Irina, Pavlunina Natalja, Pjakŝina Irina, Romanova Irina, Semjonov Jevgenij, Semjonova Zoja, Stepanova Jevgenija, Svetlova Galina, Ŝabalkin Aleksandr, Ŝabalkina Natalja, Ŝabalkin Ivan, Timle Loj, Tuvalkina Antonina)

Moskva E-klubo "MASI-FARO" (+ 1 nova membro: Meŝĉerjakova Jelena)

Murmanska E-klubo "Murmano" (15 membroj: Basavin Boris, Davidenko Jelena, Goriĉenko Olga, Levaja Maja, Makarov Aleksej, Masiukaite Jelena, Masiukas Aleksandras Julius, Nikulina Nina, Peredruk Jelena, Poĵilova Ljudmila, Rjazancev Andrej, Simonina Anna, Suĥanova Polina, Trubkina Nelja, Uljanova Galina)

Sankt-Peterburga E-societo "Espero" (5 membroj: Butkeviĉ Anna, Matusov Jurij, Aksenova Marina, Ivanov Andrej, Kosarev Vladimir)

Uljanovska E-klubo (3 membroj: Karceva Jelena, Krasnopjorova Jekaterina, Manjurova Guljnara)

Oficiala retpaĝo de Ivanova E-klubo troviĝas ĉe <www.ivanovo.ac.ru/alumni/obran/klubohod>.

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Borodin Aleksej (Krasnodara reg.), Ĉerepanov Valerij (Moskvo), Gluŝko Oleg (Ulan-Ude), Jegorov Valerij (Sankt-Peterburg), Kolosov Eduard (Volgograd), Kopajev Jurij (Kursk), Malkova Irina (Tomsk), Paĥomov Sergej (Kirov), Povorin Mikaelo (Moskvo), Sabirov Aleksej (Permj), Serova Jelena (Kostroma)

FAMILIA MEMBRO

Paĥomova Marina (Kirov)

REU-kotizoj por la jaro 2002:

100 rub. (por eksterrusianoj – 15 eŭroj) – individua kotizo (inkluzivas la membrokarton, REGon kaj aliajn informojn, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

2500 rub. (por eksterrusianoj – 375 eŭroj) – dumviva kotizo (ĉio la sama dum la tuta vivo);

20 rub. – familia kotizo (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco);

100 rub. + 20 rub. por ĉiu membro – kolektiva kotizo (REGo kaj aliaj informoj de REU por la klubo, la membrokartoj kaj voĉdonrajtoj en REU-Konferenco por la klubanoj).

*La rublaj kotizoj sendendas al **G.Kokolija** (la adreso estas en la lasta kovrilpaĝo), la eŭra kotizo pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA.*

REJM-info

redaktas Vitalij Malenko

ATS EN NIĴNIJ NOVGOROD
(01-04.05.2002)

Unue mi intencis skribi iun serioz-enuan artikolon pri tio, kial kaj kiam mi kun amikoj decidis organizi ATS, kiujn ni planis inviti ktp. Sed poste mi decidis, ke kerno de la artikolo konsistu el kompilitaj de mi skribitaj impresoj de partoprenintoj, kompilitaj de mi. Do:

Unue pri la aranĝo ĝenerale. "Mi opinias, ke ATS al mi donis sufiĉe utilajn informojn pri la historio de Esperanto, pri la movado, pri REJM kaj TEJO." "Ni havis bonan laboron por ni mem kaj por la movado ĝenerale." Iom da laŭdvortoj por ni: "fakte ĉi ATS estis kiel ideala E-renkontiĝo, ĉar la homoj emas labori, ĝustatempe enlitiĝas", ĉar ja "la organizantoj uzis nin plene kaj kruele". "Estis bonega, belega, mirakla estoso: la homoj preskaŭ ne amuziĝis, sed laboris." "Estas bone, ke la homoj estis speciale invititaj: ne estis babiluloj, malorganizantoj: ni ricevis fruktodonan renkontiĝon." "Gravega estas tio, ke la organiza teamo sukcesis ne nur kolekti, sed amikigi nin, fari veran teamon por futuraj agadoj." "Komuna laboro estis tre sukcesa." Iom pri la rezultoj. "La plej grava rezulto estas, ke homoj en la movado povas, volas krei ion utilan, kaj ke la interkomunikiĝo kaj amuzado ne estas la celo de ilia esperantistiĝo." "La ĉefa rezulto estas certe formiĝo de TOK (Tendara Organiza Komitato) de OkSEJT-42."

Kio mirigis: "Foresto de Esperantaj 'uroj' (krom Saŝa Blinov, kiu laboregis por la seminario)." "Mi komprenis, ke ĉiujn tutlandajn aranĝojn organizas ne nur ĉefoj de REJM, sed ankaŭ simplaj aktivaj homoj."

Kaj fine: "Estu ĉi seminario komenco de iu nova, seriozorientita branĉo en la rusia E-movado." "Mi kredas, ke REJM ne mortos post la renkontiĝo." "Estu ĉiam REJM."

Se temas pri miaj impresoj, mi konsentu kun jeno: "Mi ne scias, ĉu la renkontiĝo reflamigos E-movadon, sed la provo estas farita."

Tamen serioze: la homoj dum 4 tagoj laboris kaj rezulte aperis intereso ĉe junuloj okupiĝi pri REJM-aferoj kaj pri organizado de OkSEJT-42. Jam nun eblas diri, ke OkSEJT estos neordinara, fruktodona aranĝo, orientita al REJM kaj (kio estas la plej grava) al la ekstera socio. Programo de OkSEJT estas ellaborata. Koncerne TOK, ĝi konsistas nun el sekvaj respondeculoj:

Tema programo: Saŝa Sudakova (Dimitrovgrad), Ljuda Maksimova (Ĉeboksari), Vitalik Malenko (Ĵukovskij).

Vespera programo: Lena Maslova (Uljanovsk), Anja Mustafina (Ĉeboksari), Julja Garafijeva (Kazanj).

Aliĝoj kaj registrado: Kostja Viĥrov (Ĉeboksari), Lena Straĵnova (Niĵnij Novgorod).
Lingva medio, E-kursoj: Laci (Moskvo), Ajvol (Moskvo), Aleksandr Blinov (Ĉeboksari).
Speciala tago: Siringo (Moskvo).
Teama laboro: Maŝa Terjoĥina (Moskvo), Aleksej Besĉastnov (Moskvo).
Ĝenerala kunordigo, informado, reklamado: Vitalik Malenko, Etulino (Niĵnij Novgorod).

Originala kaj vere nova teamo, ĉu?

Krom OkSEJT la homoj ankaŭ volas okupiĝi pri REJM. Por proksimaj monatoj estis elektitaj jenaj labordirektoj: organizado de ATS kaj temaj seminarioj; arta komisiono; organizado de amasaj aranĝoj; informado; KER; lingva komisiono; financoj; administra komisiono.

En sekvaj numeroj de REGo vi nepre trovos informon pri progreso de la afero.

Revenante al ATS mi ŝatus esprimi grandan dankon pro la organizado de la aranĝo al Maŝa Terjoĥina, Etulino, Aleksej Besĉastnov, Kostja Viĥrov kaj apartan dankegon al Aleksandr Blinov.

Vitalik Malenko (unu el la organizantoj de ATS)

SEMAJNO EN LITOVIO

raporto de aktiva civitano

De la 10-a ĝis la 17-a de marto okazis en la bela litova urbeto Druskininkai la TEJO-seminario "Aktiva Civitaneco", kun la financa subteno de Eŭropa Junulara Fondaĵo de Konsilio de Eŭropo. Ĉi tiu temo tre interesis min, ĉar mi de tre juna aĝo provis aktivi en mia socio, ofte per pli (kiel protestaj manifestacioj kaj tendaroj, blokado de objektoj) aŭ malpli (kiel liverado de subskriboj kontraŭ io aŭ verkado de leteroj por premi sur la aŭtoritatojn) radikalaj manieroj; do mi ekpensis pri mia eventuala partopreno antaŭ longa tempo. Mi estis tre feliĉa ke mi ja sukcesis iri al Litovio kaj partopreni ĉi tiun interesegan kaj utilan seminarion.

la partoprenintaj la seminarion rusinoj (hm, gerusoj fakte!) antaŭ la ĉarma seminariejo"

La ĉefa celo de la seminario estis trejni nin – aktivulojn de diversaj sociaj organizoj (unuavice esperantistaj) – por pli efike aktivadi en niaj organizoj kaj komunumoj. Ĝuste tion mi atendis de la seminario, ĉar mi vere volis akiri novajn sciojn kaj metodojn por esti kiel eble plej efika kaj utila laboranto de iu neregistara (fek' al ŝtato!) organizo: mediprotekta, anarkiista, esperantista aŭ iu alia… Kaj mi ja ricevis la deziratan!

La programo konsistis el diversaj partoj. Je la unua tago partoprenantoj diskutis pri la nocio "civitaneco": ĝia historia evoluo kaj la moderna signifo. Al mi tre helpis tiam ĵus legita ĉapitro pri mezepokaj civitoj el la brila libro de Petro Kropotkin "Interhelpo, kiel faktoro de l' evoluo". Poste ni havis praktikon de diskutoj kaj disputoj pri sociaj kaj politikaj temoj, kaj mi iel sukcesis iĝi unu el la plej parolemaj diskutantoj – kio poste kelkfoje servis por aŭ proponi min kiel grupestron aŭ riproĉi min pri troa aŭtoritateco, depende de la situacio…

Ĉefe la unua – teoria – parto de la seminario celis instrui al ni kiel pli efike komuniki kaj labori teame, ricevigi al ni imagon pri neregistaraj organizoj kaj ilia rolo en la moderna

socio, doni al ni diversajn ilojn por organizi projektojn (kiel ekzemple financan mastrumadon kaj subvencipetadon). Ni ankaŭ iomete trejniĝis pri interkultura interkomunikado, kio estis tre amuza afero, ĉar mi spektis tiun trejnadon antaŭ monatoj en Germanio kaj sciis la regulojn (kiujn la partoprenantoj ne devis scii!). Do mi faris ĉion eblan por plikompliki la tutan rolludon kaj malfaciligi la taskon de la alia (ne mia) teamo. Rezulte ni la tutan tagon ridegis kiel frenezaj, dancis kiel ebriaj, kaj brakumis kaj tuŝis unu la alian kiel seksmaniuloj.

Dum la dua – praktika – parto ni devis mem ellabori propran projekton kaj prezenti ĝin al la subvenciantoj (kies rolon ludis niaj bravaj organizantoj). Estis entute tri laborgrupoj kaj pro tio estis prezentitaj tri projektoj: pri interŝanĝo de aktivuloj inter litovaj kaj rusaj junularaj kluboj; pri interkultura lernado; kaj pri purigado de la bordoj de la lago Bajkalo kaj plantado de arboj en tiu loko. Mi kredas ke vi jam divenis al kiu grupo apartenis mi! Mi devas konfesi ke komence mi timis ke ni malsukcesos pri nia projekto (mi kredis ke mia teamo estas la plej malforta) kaj tute fuŝos la taskon. Sed fine evidentiĝis ke nia projekto efektiviĝis tre brila kaj interesa, kaj kelkaj organizantoj poste diris private ke ili taksis ĝin la plej bona! Sed laborante pri ĝi mi sentis min tre streĉita pro la konstanta sento ke mi ĉion devas fari mem, ĉar ceteraj tri teamanoj emis nur sekvi, sed ne gvidi, kaj tute ne estis iniciatemaj, kaj unu el ili precipe malhelpis konstante penante malfaciligi la laboron per vasta spektro de manieroj. Sed fine ni ĉiuj estis tre kontentaj kaj eĉ fieraj pri nia projekto, kaj dumlaboraj streĉoj neniel influis niajn personajn amikajn rilatojn. Mi volas aldoni ke mi opinias nian projekton ankaŭ la plej realigebla, ne laste pro tio ke *Greenpeace Rusio* fakte realigas ĝin ĉiujare kaj ankaŭ ĉi-jare en aŭgusto faros same. El la tuta mondo venis jam proksimume mil aliĝoj por la tendaro.

La ĉefa manko de la seminario estis malgranda nombro de partoprenantoj. Entute partoprenis nur dek kvar personoj el kvar landoj. Sep homoj devis malaliĝi pro vizaj aŭ aliaj problemoj. Post kiam la teoria parto de la seminario jam pasis, subite (kiel neĝo sur nian kapon) aperis Oĉjo Dadaev, kiu certe plivigligis la etoson, – kvankam lia neatendita apero sufiĉe streĉis la organizantojn, pri kio Oĉjo mem tre miris kaj ofte ripetadis: “Ili estas tiaj streĉitaj, tiuj uloj, kaj konstante parolas pri 25 eŭroj por ĉiu tago…”

La kultura programo estis koncentrita je duontago, kiam ni vizitis Kaŭnon – la duan grandan urbon en Litovio. La ekskurso estis tre interesa, mi konvinkiĝis ke la lando estas tute preta eniri Eŭropan Union, kion la litovoj planas fari je tre proksima estonto. La distra programo estis sufiĉe pala kompare kun aliaj seminarioj de TEJO, sed nur pro du aferoj (kiel mi emas kredi): 1) ni laboregis la tutajn tagojn kiel damnitaj – kun tre mallongaj paŭzoj kaj ĝis malfrua vespero; 2) la nombro de partoprenantoj ja estis malgranda.

Pluraj momentoj estis tre agrablaj surprizoj por mi. Mi renkontis malnovajn eksterlandajn amikojn kaj akiris la novajn, konatiĝis kun ege bonkoraj junaj homoj, malkovris ke ekzistas speco de inteligentaj kaj interesaj katolikaj kristanoj, kontente konstatis ke intereso pri mediprotektado kaj anarkiismo estas tre alta inter gejunuloj el Eŭropo kaj Ameriko.

Mi volas noti, ke la organizantoj faris nekredeble bonan laboron pri pretigo de ĉi tiu seminario, kaj danki ilin ĉiujn kaj precipe la lokan organizan teamon (Evgenij Gaus kaj Ramune Matiukaite) pro bonegaj kondiĉoj kaj interesega kaj riĉa enhavo de la seminaria programo.

Por mi la seminario certe estis utila – ĝuste kiel mi esperis, reveninte al Moskvo mi tuj komencis apliki ricevitajn en Druskininkai sciojn en mia organizo (mia hejmo kaj mia familio, fakte) – *Greenpeace*, kaj post unu semajno ekokupis postenon de la kunordiganto de la nova kampanjo “Rekta Dialogo”. D’oĥ, la vivo estas amuza foje!

Oleg Izjumenko (Moskvo)

APLIKATA ESPERANTO

Ni havas la lingvon, kiun ni ne tre ofte uzas utile eĉ malgraŭ la fakto ke kelkaj el ni nomas nin "diaspora minoritato". Certe necesas kuspi tiun aĉan tradicion. Jen iom da vivosperto en Esperanto.

Inter esperantistoj riĉuloj ne multas. Plejparte ni estas de la "meza tavolo". Multaj el ni ofte transloĝiĝas, ŝanĝas loĝurbon ktp. Dum tia vivo E-junularo ofte havas bezonon lui ĉambron. Ĉi-subas utilaj konsiloj pri la afero:

– Plej unue ne pensu, ke lui ĉambron estas tute facile. Vin atendas multaj obstakloj. Estu firmaj.

– Se vi decidis agi pere de agentejo, sciu ke ekzistas tiel nomataj "informaj" agentejoj, kiuj postulas de vi ŝajne ne grandan (ĉ. 500 rubloj) kotizon antaŭ ekserĉo de io luebla. Tute certe vi nur perdos la monon kaj vian valoran tempon. Eĉ ne parolu kun tiaj. Memoru, ke seriozaj agentoj prenas pli grandan sumon – kaj nur kiam vi jam ĉion subskribos kaj ricevos la ŝlosilojn. Laŭ miaj kalkuloj, nur en Peterburgo nur el naiva esperantistaro la "informagentejoj" elsuĉis ĉirkaŭ 1500 rublojn (aŭ 15 abonoj de "REGo"). Domaĝe.

– Kiam vi venos kontroli la lueblan ĉambron, ne ĝenu vin kaj ne sidu silenteme. Ĉion tuŝu, ĉien ŝovu la nazon, multe demandu, parolu kun hazarde renkontitaj najbaroj: antaŭ subskribi ion ajn vi devas certiĝi, ke oni vin ne trompas.

– Demandu la luiganton pri tio, kial li/ŝi decidis luigi la ejon. Se tion kaŭzas nur momenta bezono de mono (paneo de aŭtomobilo, malsano ktp.), vi riskas perdi vian novan hejmon jam post du-tri monatoj.

– Nepre eksciu la plenan sumon por ĉio, kion vi pagos. Pago por telefono, elektro, varmenergio ktp (aldone al la lupago) ne estas memkomprenebla – pri ĝi necesas interkonsenti kaj fiksi en la kontrakto.

> Kruko: Kial la submaraj plonĝistoj ĉiam saltas malantaŭen?
> Baniko: Facile! Ĉar se ili saltus antaŭen, ili falus en la boaton!
> *(esperanto-anekdotoj)*

– Kontraktoj estas bona afero. Kutime kontrakto donas iujn rajtojn al vi: ekz., vi rajtas skandali, se la luiganto vizitas la luitan ĉambron sen via permeso; vi rajtas ekscii pri via eventuala forpelo antaŭ dek tagoj, ktp. Se la luiganto ne respektas viajn rajtojn kaj se tio kaŭzas vian disiĝon, vi rajtas rericevi unumonatan lupagon. Certe ĉio ĉi devas esti klare priskribita en la kontrakto.

– Ne foriru el la ĵus luita ĉambro, se vi ne mem ŝlosis ĝin. Restu laŭeble pli longe dum la unua vizito, revenu kun la aĵoj laŭeble tuj post la luo. Memoru, ke sur la bedo de loĝejmanko floraĉas ekz. multfoja luigo (samtempa luigo al kelkaj personoj kun celo akumuli grandan monon, ŝlosi la pordon kaj malaperi porlonge). Pro la sama risko kontrolu mem ĉiujn dokumentojn, precipe la pasporton kaj domicilon de la luiganto. Se oni al vi diras, ke la ĉambro ankoraŭ ne estas preta, ke necesas..., ke estos... – ne aŭskultu dupe, sed … (relegu la unuajn liniojn de ĉi alineo).

– Ne rapidu tro. Se vi pri io dubas, pensu, demandu, foriru. Jes – ja vi ĉiam povas foriri, ne sorĉitiĝu!

– Memoru, ke vi estas bona luanto (homarano! klera homo! ne narkotulo, espereble). Ne forgesu tion ĉiel substreki. Ne havu hundon kaj ne fumu.

– Prefere serĉu tra reto de viaj konatoj. Tiel vi povas trovi iun parencon de konato de frato de la edzino de via bona amiko aŭ iun ankoraŭ. Tio jam sufiĉos por vi ne timu unu la alian. La luigantoj ja ankaŭ timas. Krome "konatulaj" prezoj estas averaĝe duoble pli malaltaj ol ĉe agentejoj kaj aferaĉistoj. Iel tiel, pere de konateco, mia (kaj eble via) konato luis unuĉambran apartamenton en Peterburgo kontraŭ mil rubloj monate. Eĉ por ĉambro en plurfamilia loĝejo estas tute modere.

– Eĉ se vi estas eminentulo en la Movado, ne tre esperu je konataj esperantistoj. El ili multaj mem estas malriĉaj revemuloj, elspezantaj lastan monon por aboni dudekon da E-gazetoj. Tiuj, kiuj tamen povas ion por vi trovi, ne tre serĉos, ĉar en ilia urbo antaŭ deko aŭ eĉ pli da jaroj iu (apud)esperantist(in)o iun jam trompis (aŭ provis trompi; aŭ al oni ŝajnis, ke li/ŝi provis). Certe sciigu la E-medion, ke vi serĉas ĉambron – eble tio helpos vin, kiu scias. Persone al mi helpis iama najbarino el aspiranta komunloĝejo, kies amikino el Kazano edziniĝis al peterburgano, kies gepatroj planis luigi ĉambron. Rezultiĝis modera prezo kaj bonaj kondiĉoj en bonega urboparto. Kiu estas avertita, tiu estas armita.

Slavik Ivanov (Vladikavkaz/Peterburgo)

NOVAJ REJM-MEMBROJ

pagintaj la kotizon por 2002

Aleksej Besĉastnov (Moskvo)
Jekaterina Burmisova (Ĉeboksari)
Vitalij Malenko (Ĵukovskij)
Marija Terjoĥina (Moskvo)

REJM-KOTIZOJ POR LA JARO 2002

80 rub. – individua kotizo (inkluzivas la insignon, REGon, aliajn informojn, eblecon partopreni en REJM-seminarioj, voĉdonrajton dum REJM-konferenco, rabatojn dum E-aranĝoj kaj ĉe uzo de servoj de REJM);

30 rub. – la samo sen REGo;

15 eŭroj – por eksterlandanoj;

ne malpli ol 200 rub. – patrona kotizo.

La rublajn kotizojn sendu poŝte al la financisto de REJM-komitato Ĵuravljova Jevgenija Valerianovna ***(str.Algeŝevskaja 25A, 428012 Ĉeboksari)*** aŭ transdonu al eventuala REJM-komitatano en via urbo.

La eŭra kotizo pagendas al la konto ***kklg-r*** ĉe UEA.

Atentu ke rajtas re-aliĝi la membroj-2001, ĉiuj aliaj devas trapasi REJM-ekzamenon aŭ A-nivelan ekzamenon de ĈALK de REU.

La demandojn bv. sendi al la adresoj de REJM (vidu en la dua kovrilpaĝo).

La redakcio de REGo memorigas, ke REJMinfo estas preparata de REJM kaj ĝia komisiito Vitalij Malenko, kiuj plene respondecas pri la enhavo de la rubriko kaj uzataj en ĝi esprimoj.

Eksciu, ke...

NIA INFANECO PASIS EN VLADIMIR

"Reveno al infaneco", Vladimir, 01-05.05.2002

La antikva urbo Vladimir la 1-5-an de majo multfoje estis surprizita vidi plenkreskajn "infanojn" sur siaj ĉefstratoj kaj placetoj: jen ni paŝas popare kaj ekludas dummarŝe "rojeton", jen ni ronde staras kaj gajege ludas, jen niaj "kozakoj" ĉasas la "rabistojn", diskurante laŭ la surasfaltaj sag-signoj, jen ni flugigas paperajn aviadiletojn de sur la monteto apud la Ora Pordego – kiu tutcerte ankoraŭ memoras niajn kajtojn, enĉieligatajn de la sama loko kaj en la samaj tagoj pasintjare...

kantas "infana koruso"

Jes, IGRA – la Iniciata Grupo de Rusiaj Aktivuloj – jam la duan fojon organizas por ni la bonegan majan fest-ripozon en la ĉarma kaj jam karmemora Vladimir. Atentindas, ke inspirantoj de la aranĝo strebis kaj sukcesis maksimume flankiĝi de la programpreparo kaj programgvidado: la "griza generalo" Dima Oŝĉepkov preferis tute ne vidigi sin (sed ni ja scias...), Oĉjo Dadaev okupiĝis strikte nur pri la ejo kaj la ekskursoj kaj mirinde ne enmiksiĝis senbezone. Do, fakte ĉion gvidis la ĉeboksaraninoj Nadja kaj Ljuba Ĥaritonova-j (kiuj estis en la Organiza teamo de IGRA dum EoLA-14) kaj Olesja Oŝĉepkova (tre bone sin montrinta ankaŭ dum la pasintjara Vladimira "Oriento"). La knabinoj laboris tre bone kaj meritas ĉiujn laŭdojn!

infanaj ludoj estis ne malhavebla parto de la programo

Laŭ la pritakso de Dima – al kiu mi plene aliĝas – la aranĝo tute sukcesis konvene al la celoj: bonega ripozo en malenua esperantista etoso. De matenoj ĝis meznoktoj funkciis iuj programeroj, ne postulantaj fortajn intelektajn streĉojn. Multaj (por)infanaĵoj specifigis la programon: "infanĝardenaj" studokupoj pri aplikacio, infanaj dancoj, modlado, pentrado, desegnado, kantado, pup-teatrumado, paperfaldado, "lernejaj" lecionoj pri Esperanta gramatiko (poeziforme!), matematiko, deklamado (kun pionireska agit-muntaĵo pri Esperanto), kortaj infanaj ludoj dum interlecionaj paŭzoj, ekskursoj al la muzeo de antikva lernejo kaj Planetario, ekspozicio de ludiloj... Ne malestis ankaŭ ne nepre infaneskaĵoj: konkura petveturado al Suzdal kaj preparita de Nadja tuttaga urba ludo tie, mia trejnado pri psikologia subteno en dialogoj, rolludo gvidata de Olesja, teama kvizo de Garik, trompludo ("naduvaloĉka") de Juka kaj ... certe, mi ion forgesis. Ha, jen:

okazis la Horo de solidareco – komuna leterumado subtene al iranaj E-komencantoj. Sed pri tio legu la apartan artikolon (paĝo 21). Kaj – ĉu eblas ne mencii la "perlon de la sezono", aperintan dum tiuj tagoj en Vladimir: la frenezige ridindan infanludon "Salami"? La ĉeestintoj min komprenos.

Kio pri Esperanto? Multe pli bone, ol ni povus supozi. Eble, duono de la aranĝoj pasis en nia lingvo. Ne miru – mem kalkulu (ankaŭ mi surpriziĝis, kiam kalkulis!).

Mi revenis en Moskvon en bonega humoro kaj en bonega labora formo, kun plena konvinko, ke persone mi kapablas kaj povas fari plensukcese absolute ĉion. Kaj mi kredas, ke ĉiu Vladimira "infano" akiris novan inspiron kaj novan energion por aktiva vivo en Esperantujo. Se obligi tion je grandioza inspiro de la partoprenintoj en la Niĵnij-Novgoroda ATS – ni povos montojn formovi! Aŭ – la planedon verdigi?

kore kaj kunlabore via – Irina Gonĉarova (Odincovo)

LINGVA FESTIVALO EN VOLGOGRADO.

La ideo de Lingva Festivalo evidentiĝis tiom interesa kaj produktiva, ke ĉi aranĝo triumfe paŝas laŭ urboj kaj landoj, kolektante grandegan kvanton de partoprenantoj. (Etaj ekzemploj: en Ĉeboksari pasintsezone estis 1500 vizitantoj, en Berdjansk – 1000).

Ankaŭ en Volgograd la 17-an de februaro pasis la unua LF. Aktivege en la organizado partoprenis novaj esperantistoj, kiuj ĵus finis kurson. Mi opinias, ili faris la "leonan" parton de laboro. Prezentiĝis 13 lingvoj, sed ĉiu gasto povis viziti maksimume 4 prezentojn. Kurtaj invitoj al la lecionoj dum solena malfermo estis prezentitaj tiom artiste, bonvole kaj alloge, ke vere malfacilis elekti. La plej popularaj estis la susua (oni parolas ĝin en Gvineo) kaj la ĉina. Eo okupis la 5-an lokon. 10 personoj (teamoj) prezentis siajn naciajn lingvojn. Al nia internacia festo venis 250 urbanoj. Multaj volonte partoprenis gajajn lingvajn konkursojn kun premioj (gvidis esperantistoj Roman Saveljev kaj Tatjana Volodina).

Promenante en la haloj oni povis rigardi ekspozicion de lernolibroj, vortaroj kaj standoj kun pli profundaj kaj interesaj informoj pri lingvoj kaj kulturoj. Tiel ni penis zorgi pri tradicioj de LF. La unua Festivalo en Tuluzo (1987) konsistis ĝuste el standoj.

Kun rido kaj ŝercoj pasis loterio, kiu okazis post internacia koncerto. La ĉefa premio estis granda kaj bele eldonita mapalbumo kun detala informo pri landoj, popoloj, lingvoj, religioj. Ĝin subskribis instruistoj de ĉiuj lingvoj, prezentitaj en la Festivalo. La gajnintino ĝojkriis pro feliĉo. La koncerto okazis en tre komforta granda halo en urbocentro, apartenanta al la Instituto de Artoj. Ĝin disponigis al ni Volgograda Regiona Komitato pri Junularaj Aferoj. Esperantistoj bone ornamis la ejon per naciaj flagoj, aerbalonoj, pentraĵoj pri vivo de diversaj popoloj ktp. La prezentiĝojn mem oni povas nomi brilaj. Ni kvazaŭ vojaĝis tra landoj, kulturoj: plenaj de sentoj, kantoj, dancoj, naciaj kostumoj...

Vizitantoj emocie esprimis sian ravon pro la festo. Kelkaj diris, ke eĉ ne atendis, ke estos tiel bonege, tiel interese!

Bedaŭrinde mi ne povas rakonti al vi pri la etoso en klasĉambroj kaj haloj, ĉar dum ĉiuj 4 sesioj mi prezentis Eon. Sed mi povas supozi, kia ĝi estis, ne nur laŭ rakontoj, sed ankaŭ laŭ vera entuziasmo, brilinta en la okuloj de venintoj al miaj lecionoj. 9 el ili jam studas Eon en la kursoj. Estis ege surprize kiam iu solida sinjoro montris al mi sian propran projekton de internacia lingvo. Indas diri pri Jelena Kuzjmina. Tiu 19-jara knabino unuan fojon eksciis pri Eo en la LF. Post 8 tagoj ŝi jam veturis al fama rusia arta festivalo EoLA en Ĉeboksari kaj fariĝis laŭreato!

Nia multnacia urbo – en Volgograda regiono loĝas anoj de 100 (!) etnoj – tre bone akceptis novan por si aranĝon. Aŭdiĝis dankvortoj, sukcesdeziroj al organizantoj por la sekva jaro.

Ĝojigis nin la atento de lokaj amaskomunikiloj. 12 gazetoj publikigis diversĝenrajn ar-

tikolojn pri la Festivalo.

Apartan kaj tre sinceran dankon nia organizteamo volas diri al la samideanoj el la tuta mondo, kiuj per siaj amikaj salutoj subtenis nian LF. Tiuj estis: Sonja Petroviĉ, TEJO–estrarano pri seminarioj (Jugoslavio); Konstantin Demjanenko, UkrEA-estrarano kaj membro de Organiza Komitato de LF en Ukrainio "Planedo"; Rikardo Karrillo, vicprezidanto de Kolombia E–Ligo (Kolombio, Sudameriko); Danil Kapitonov, prezidanto de JEAĈR (Ĉuvaŝa Respubliko); Nirab Kayastha (Nepalo); Odesa E-klubo "Verdaĵo". Dankon, karaj amikoj! Via subteno kortuŝis kaj entuziasmigis nin, ĝi vere estis grava kaj bezonata!

Mi ne troigos, se diros, ke la LF vigligis la vivon en Volgogrado. Komitato pri Junularaj Aferoj, kiu plene (!) financis la aranĝon, estis tre kontenta kaj eĉ proponis al ni daŭrigi la kunlaboron. Inter ordinaraj homoj en nia urbo antaŭ 7 monatoj multaj ne sciis kio estas Eo. Nun, post la prezento dum la urba festo, loka televidprogramo, 2 samtempaj kursoj kaj LF, mi aŭdis, ke oni en bushaltejo parolis pri Eo! Volgogradaj scienculoj en intervjuo diris, ke Lingva Festivalo estas tre bona kaj utila iniciato por nia urbo kaj esprimis esperon, ke ĝi daŭros en la sekvaj jaroj.

Do, karaj samideanoj, ne hezitu fari LF-n, donacu feston al via urbo.

Polina Miĥajlova

LINGVA "PLANEDO" EN BERDJANSKO

Tio denove okazis en nia urbo Berdjansko (Ukrainio), kiu troviĝas sur la bordo de Azova maro, la 16-17-an de marto 2002. Kaj tio estis la 2-a lingva festivalo "Planedo".

Eble iu el legantoj ĝis nun ne scias, kio estas lingva festivalo (LF). Ĝi estas aranĝo, dediĉita al diversaj lingvoj kaj kulturoj. LF estas konstruita tiel, ke dum festivalaj tagoj en iu elektita lernejo, instituto aŭ kulturdomo pasas diversaj lingvoprezentoj, kiuj estas tre kurtaj (en nia okazo ordinara prezentolongo estis 30 minutoj), sed plenaj de specialaj informoj pri iu nacia (aŭ plan-) lingvo: pri gramatiko, pri popoloj kaj landoj, kiuj uzas la lingvon, pri kulturoj, ligitaj kun la lingvo, pri ebloj lerni la lingvon ktp. Ĉiu lingvo dum la Festivalo havas propran "hejmon", kiu estas, plej ofte, klasĉambro. Krom la prezentoj enkadre de la Festivalo oni organizas diversajn konkursojn (ekz. por poliglotoj), kulturekspoziciojn, internaciajn koncertojn. Se vi ŝatus ekscii pri tio pli detale, turnu vin al Katerina Jevlampieva, TEJO-komisiito pri LF-movado (unu el ŝiaj retadresoj estas <molod@cap.ru>).

La unuan festivalon ni organizis en 2001. Dank' al prepara laboro la organizan komitaton de la 1-a LF konsistigis, krom reprezentantoj de nia Berdjanska Esperanta klubo "Verda Mevo" (Ukrainia Esperanto-Asocio), oficistoj kaj lingvofakuloj el la lernejo № 15, la kulturdomo "Neftehimik", Berdjanska ŝtata pedagogia instituto (BGPI), Berdjanska entreprena instituto, urbestrejaj klerig- kaj kulturkomitatoj. La oficialaj subtenantoj, krom TEJO, iĝis Azova regiona universitato kaj Azova fiŝmastruma instituto. La Festivalo trovis ankaŭ multajn informsponsorojn, inter kiuj estis la tutukrainia gazeto "Zagranica", Berdjanska urba televida kompanio, radiostacioj kaj gazetoj. Kaj… jam la unua LF en Berdjansko pasis brile. Kiel fondinto de la festivalo, tute negranda kaj senmona E-klubo ekhavis grandegan influon al la LF-aranĝoj, kaj esperantistoj fariĝis la plej bonaj geamikoj por ĉiu lingvoinstruisto aŭ lingvoŝatanto en la urbo. Nur tiu urbano, kiu ne eliris el sia hejmo, ne aŭskultis radion, ne spektis televidon kaj ne legis gazetojn, ne aŭdis pri Esperanto. Multaj eksciis kaj sincere ekinteresiĝis pri Ukrainia Esperanto-Asocio kaj TEJO. Ĉu vi scias, kio estis la muzika temo de LF en solenaj aranĝoj, radiaj kaj televidaj reklamoj? "La Bamba"! Diversajn aranĝojn de la unua LF en Berdjansko (17-18 de marto 2001) vizitis pli ol 2000 homoj.

Pasis unu jaro, kaj LF, kiu en Berdjansko ricevis propran nomon – "Planedo", revenis. Vere, ĉi-foje ĝi okazis en tre maltrankvila tempo – du semajnojn antaŭ la parlamentaj kaj urbestraraj balotoj, kiuj povus forturni la atenton de la civitanoj. Sed malgraŭ la politika fono LF denove okazis. Al niaj informaj sponsoroj aldoniĝis TEJO-revuo "Kontakto", kio ebligis diri, ke pere de Esperanto pri la LF en Berdjansko oni legos en dekoj de landoj.

Komence de majo en Jalta okazis tradicia Esperanto-festivalo ***"Aroma Jalto 2002".*** *La etoson de la aranĝo transdonas la fotoj, faritaj de Anastasija Baŝlikova (Moskvo)*

Ĉi-foje dum la festivalo estis prezentitaj 17 naciaj lingvoj (angla klasika, angla usona, greka, bulgara, nederlanda, hebrea, latina, germana, pola, rusa, slovaka, turka, ukraina, franca, japana, itala, hispana), 2 planlingvoj (Esperanto kaj Interlingua) kaj 4 popol-profesiaj kaj specialaj lingvoj (rusia "fenja" – la slango de krimuloj, mara flaga semaforo, morsa alfabeto, gestolingvo). Ses Esperanto-prezentojn vizitis ĉirkaŭ 70 homoj, plejparte gelernantoj kaj gestudentoj. Same kiel pasintjare ĉiu partopreninto de LF plenigis demandfolion, en kiu oni nomis la plej popularajn lingvoprezentojn. La unuan lokon okupis la turka lingvo, la duan – la hispana, la trian – la franca. Entute nur "lingvan parton" (se ne kalkuli tiujn, kiuj spektis la internacian koncertan programon) de LF en 2002 vizitis pli ol 1000 homoj.

Malgraŭ ke la Esperanto-prezento ne iĝis la plej populara, oni esprimis grandan intereson al nia lingvo (grandparte pro bona gvidmaniero de berdjanska studentino de BGPI Katerina Semjonova, kiu preparis kaj gvidis la prezentojn de Esperanto). Ankaŭ aktive laboris en organiza komitato de la festivalo esperantistinoj Svetlana Akulenko kaj Olga Ŝirganova, ambaŭ estas studentinoj de BGPI. Vere multe helpis subteno per salutmesaĝoj de diverslandaj gesamideanoj. Sinceran dankon al ili!

Unu el niaj gravaj konkludoj estas jena. Esperantan prezenton kaj mem Esperanton dum LF multe pli popularigus alveno de geamikoj-esperantistoj, Esperantaj muzikistoj kaj kantistoj el malproksima kaj proksima eksterlando. Ekzemple, se prezenton de Esperanto farus kune svedo, italo, ruso kaj ukraino, nenio pli bone povus montri la internacian karakteron de la "lingvo internacia", de E-movado, E-etoso… Tial, konsile al aliaj LF-organizantoj, kiuj nur komencas sian agadon, ni proponas serĉi eblojn por inviti eksterlandajn gastojn. Eble eĉ TEJO faru specialan projekton subtene al LF-movado.

Organizi LF-n estas vere interese. Provu tion fari, kaj vi trovos multegajn novajn geamikojn!

Konstantin Demjanenko (Ukrainio)

UAM INVITAS PROFESIIĜI PRI ESPERANTOLOGIO!

La Universitato de Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań, la dua plej granda universitato en Pollando ofertas 3-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko. La internacia kurso okazas en la Lingvistika Instituto, sub la gvido de d-rino Ilona Koutny, membro de la Akademio de Esperanto. Inter la prelegantoj estas elstaraj esperantologoj, kiel profesoroj John Wells, Humphrey Tonkin kaj Michel Duc Goninaz; doktoroj Vera Barandovska-Frank, Detlev Blanke, Zbigniew Galor, Katalin Kováts (Smideliusz) kaj Blazio Vaha; la poetino Lidia Ligęza kaj eksredaktoro de "Esperanto" István Ertl.

La Interlingvistikaj Studoj donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. Pro la metodika formado la Studoj ricevos specialan rolon en la instruista trejnado dum la sekva periodo.

Surloka kurso (unusemajna sesio) okazos unufoje dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro). La gestudentoj pretigos diplomlaboraĵojn kaj post la fina ekzameno ricevos atestilon pri Interlingvistikaj Studoj. La unuaj gestudentoj (el Ĉehio, Germanio, Makedonio, Usono kaj Pollando) diplomiĝos ĉi-jare.

Partoprenontoj povas aliĝi el la tuta mondo por la studjaro 2002/2003 ĝis la 15-a de aŭgusto 2002. Pli frua anonco estas bonvena. Postuloj: fino de mezgrada lernejo (kun abiturienta ekzameno aŭ egalvalora) kaj bona scio de Esperanto. Partoprenontoj devas plenumi orientigan teston antaŭ la komenco de la Studoj. Kelkaj stipendioj estas antaŭvidataj. Kotizo por unu semestro: 400 EUR (por nepagipovaj landoj ĉirkaŭ 120 EUR).

Por pluaj informoj kaj aliĝilo bonvolu kontakti d-rinon I. Koutny: Lingvistika Instituto de UAM, ul. Międzychodzka 3-5, PL-60-371 Poznań; tel. + 48 61 8292709; rete <ikoutny@amu.edu.pl>.

La septembra sesio (23-27.09.2002) estas kunligita kun la semajnfina kultura renkontiĝo ARKONES, same en Poznań, kiu post la intensa tutsemajna serioza laboro ebligas malstreĉiĝon (kun teatraĵoj, muziko, diskutoj, ktp).

EN ĈEBOKSARI ESTIS INTERESE

La 3-a Festivalo de Interesoj – Respublika Festivalo de Junularaj Sociaj Unuiĝoj

23-24-an de marto 2002 en Ĉeboksari okazis la tria Festivalo de Interesoj. La organizantoj estis Ŝtata Komitato de Ĉuvaŝa Respubliko pri Junularaj Aferoj, Centro de Subteno de Junularaj kaj Infanaj Sociaj Organizaĵoj de Ĉuvaŝa Respubliko, Centro de Subteno de Nekomercaj Organizaĵoj "Sluĵenije", "Ronda tablo" de Junularaj kaj Infanaj Organizaĵoj de Ĉuvaŝio (unu el ĉefaj membroj de kiu estas JEAĈR) . Celo de la Festivalo estas spertinterŝanĝo inter organizaĵoj kaj evoluigo de ilia kunlaboro, konatigo de junularo kun organizaĵoj ekzistantaj en la Respubliko.

Ĉi-jare la Festivalo daŭris du tagojn. Dum la unua partoprenis pli ol 120 aktivuloj de respublikaj organizaĵoj el diversaj partoj de Ĉuvaŝio. La ĉefa tasko de la unua tago estis instrua. Dum du horoj estis viziteblaj majstro-klasoj laŭ la temoj: 1. Organiza manaĝerado; 2. Laboro kun subvencifontoj; 3. Komerca ludo "Projektpreparado por konkurso"; 4. Rilatoj kun socio en junularaj sociaj organizaĵoj; 5. Volontuloj en organizaĵo. Sekvatage la pordoj de la Festivalo estis malfermitaj por ĉiuj dezirantoj. Tasko de la dua tago estis konatigi junularon kun junularaj sociaj organizaĵoj, kun ilia agado. Ĉi-tage inter murojn de Lernejo de Kulturo venis pli ol 650 vizitantoj – lernantoj, studentoj, spertuloj pri junulara agado.

Inter la prezentitaj organizaĵoj indas noti: milit-patriotaj, sport-turistaj, sociaj, unuiĝoj edukaj kaj lernejaj, ekologiaj, internaci-kunlaboraj. Krome partoprenis Centro de spirita kul-

turo “Raduga”, Natur-historia societo “Terra incognita”, Naturesplora klubo “Karaŝ” ktp. Dum la prezentoj la organizaĵoj ne nur rakontis pri si mem. Ili ankaŭ montris sin kaj donis ŝancon por dezirantoj eĉ “surmeti fremdan haŭton”. Ekzemple la turistoj proponis senti sin kiel en montaro descendante per ŝnuroj, sportistoj proponis lukti, rolludistoj – historie ludi k.s. Krome estis organizita ekspozicio de la organizaĵoj.

La Festivalo finiĝis per koncerto.

Danil Kapitonov (Ĉeboksari)

SEMINARIO EN IVANOVO

23-24.03 en Ivanovo pasis la Seminarieto por komencantaj E-instruantoj, iniciatita de Ivanova E-Teamo. Por gvidi la laboron el Moskvo estis invitita Irina Gonĉarova. La aranĝon tuttempe partoprenis 7 personoj kaj ankoraŭ kelkaj – partperiode. En la programo estis: ekzercado pri Eo; konatiĝo kun la enhavo de la 1-a kaj 2-a lecionoj de la nova E-kurso “Novuloj-bravuloj”, bazita parte sur FaRo (Faru la Rondon) kaj esence – sur la ludmetodo de Andrej Grigorjevskij (la kurso estas gvidata de Sonjo Ŝejnina kun helpo de la multnombra kaj tre entuziasma Teamo); partopreno en la 2-a leciono de la kurso kun posta ĝia analizo fare de ĉiuj teamanoj; prelegoj de I.Gonĉarova pri esplorado de instrusituacio (kun praktikaj ekzercoj), metodoj de E-instruado (kun aktivaj kontribuoj de la partoprenintoj); prezento de la 6-a FaRo-leciono. En la paŭzoj okazis didaktikaj ludoj, kantoj kaj manĝoj.

Irina Gonĉarova (Odincovo)

IMPRESOJ KAJ SENTOJ PRI STRELKA-4

Strelka-4 okazis, kiel estis promesita, en Niĵnij Novgorod, en la mezlernejo № 154, de 31.03 ĝis 01.04. En ĝi partoprenis (registriĝis) 73 homoj el Moskvo, Ivanovo, Ĉeboksari, Kovrov, Dimitrovgrad, Tverj, Niĵnij Novgorod kaj la regiono. Dankon al ĉiuj venintoj!

Absolute subite ĝi akiris la temon “Gvidanteco”, eble dank’ al la seminario en Litovio, en kiu mi partoprenis. Dum Strelka okazis 3 diversaj trejnadoj kun la sama nomo “Mi estas gvidanto”, kun farboj, kun lignaĵoj kaj kun ovoj. La lastaj du estis nomitaj la plej interesaj aranĝoj de la renkontiĝo. La dua loko estis donita al interkona vespero kun elementoj de Esperanto, kaj al lingva ludo, kie sonis nur Esperanto. Rezulte de la lingva ludo nun niaj klubanoj kverelas nur pere de aboco. Kaj ekde la 1-a de aprilo 2002 tiujn, kiuj decidos iĝi membroj de la klubo “Ĉapelo”, atendas vere kruela tasko: diri rapide kaj senerare la vorton “eksbogefimalplisanetulejegestridaĉariĝadilo”, kreitan de Strelka-partoprenintoj, kaj, por ke ni rekomendu ilin al REJM, klarigi, kion ĝi signifas.

La 31-an de marto (preskaŭ dum la tuta tago) ni havis programblokon pri kaj por Esperanto: kursoj – moviĝema ronda tablo – prelegoj – lingva ludo – premiado. Mi kore dankas Laci kaj Sonja Ŝejnina pro la brilaj lecionoj de Esperanto, Siringon pro la interesega rakonto pri internaciaj renkontiĝoj, Oĉjon Dadaev – pro entuziasmoplena fantazio pri graveco kaj forto de REJM, REU kaj TEJO, Garik pro la premioj (REGoj) kaj ĉiujn esperantistojn pro kreado de vere esperantista etoso. Sabate ni komencis la novan kurson por komencantoj, ĉi tie estas 8 gejunuloj, kiuj volas lerni Esperanton, iĝi membroj de la klubo “Ĉapelo”, desegni por ĝi emblemon, verki himnon kaj post tio aliĝi al REJM kaj ankaŭ tie ĉion ŝanĝi.

Kiel vi scias (aŭ ankoraŭ ne scias, do tuj eksciu), antaŭ Strelka unu el la plej popularaj inter studentoj de NN gazetoj dum 6 semajnoj publikigis diversajn informojn pri Esperanto (10 faktoj pri Esperanto, kiujn devas scii ĉiu; 5 la plej popularaj misopinioj pri Esperanto; 5 metodoj veturi pere de Esperanto; 5 vojoj por fari karieron en E-movado ktp). Ĉiu artikoleto estis sekvata per unu demando pri Esperanto, kaj personoj, kiuj donis la plej bonajn respondojn, devis ricevi premiojn dum Strelka. Bedaŭrinde, al Strelka ili ne venis, sed ni donacis temvortaretojn, kantaretojn kaj Kontakto-vortaretojn al ili dum la unua klubkunveno

post Strelka.

Kion ankoraŭ mi volus diri kaj vi – ekscii? Laŭ ni Strelka sukcesis. Mi volus aparte danki ĉiujn, kiuj preparis la aranĝon. Kaj ni dankas ĉiujn "streloĉnik"-ojn pro aktiva partopreno, toleremo al malsukcesoj en la programo kaj honesteco en la bufedejo. Imagu – oni mem manĝis, mem kalkulis, mem pagis kaj la bufedo estis profita! Ni atendos vin ĉiujn en Strelka-5 – jubilea Strelka, kiu, verŝajne, okazos en Niĵnij Novgorod en 2003.

Kun amo kaj respekto,

Etulinka (Jelena Akimova, Niĵnij Novgorod), en la nomo de "Ĉapelo"

PASIS LA VICA KONFERENCO

La 35-a Moskva malfermita Konferenco de sciencistoj-esperantistoj, kiujn ĉiutrimestre aranĝadas Moskva Scienca E-klubo (MSEK) "Scio", pasis 25.02.-01.03.2002.

Ĉi-foje plimulto de la prelegoj en la Konferenco tiel aŭ alie estis ligitaj kun geografio, kvankam tuŝis ankaŭ historiajn, etnografiajn, politikajn, eĉ turismajn aspektojn.

Mi diru pri sekvaj temoj de la prelegoj: "Vojaĝoj laŭ Koljskij duoninsulo kaj la kabo 'Kanin nos' ('Kanina nazo')" (la preleginto – membro de Moskva Turista Klubo K.F.Goroĥov); "Norda Jemeno en la 60-aj jaroj de la pasinta jarcento" (prelegis surbaze de la propraj impresoj profesia arabisto V.V.Samodaj); "Mezepokaj kasteloj de Luara" (la preleginto – estonta geografiisto R.Antonov). Ĉiuj tiuj prelegoj estis akompanataj per montrado de lumbildoj aŭ kino-ilustraĵoj.

Ankaŭ estis aŭskultitaj prelegoj: de membro de la Internacia Akademio de sciencoj de ekologio kaj sekura vivagado, kandidato de biologiaj sciencoj B.G.Reĵabek – "V.I.Vernadskij kaj nuntempa disvolviĝo de la ideo de noosfero"; de kandidato de fizik-matematikaj sciencoj V.V.Korĉagin – "Metodoj de la komunikado en Interreto". Krom tio estis nia jam tradicia rubriko "LoGoSo" (Leksiko-Gramatika Simpozio).

En fino de la Konferenco sonis kantoj kun gitara kaj magnetofona akompanado, kiuj estis plenumitaj de E.Tarĥan, B.G.Reĵabek, kaj ankaŭ registritaj kantoj en la plenumo de A.A.Kabanceva.

Kunsidojn de la Konferenco vizitis 42 personoj, entuta kvanto de la vizitoj estis 90. Por ni restas plendi, ke praktike malestas kontaktoj kaj kunlaborado inter la E-kluboj "Lev Tolstoj" kaj "Scio". Mi certas, ke iliaj interrilatoj devas esti pli varmaj kaj amikecaj, ĉar tio nepre servus al sukceso de nia ĝenerala afero – al propagando kaj disvastigo de Esperanto.

Vladimir Edelŝtejn (Moskvo)

P.S. Mi aldonas versajn impresojn de K.S.Ilutoviĉ, inspiritajn de la prelego pri Jemeno.

AŬSKULTANTE LA PRELEGON DE V.V.SAMODAJ PRI NORDA JEMENO EN 60-AJ JAROJ DE LA 20-A JARCENTO

Sunsubire, festa kamelaro,
Flava muĝ' de polvoŝtorma vent'
Kaj blueco de la Ruĝa maro
Vivis en la slajda Orient'.
Fumis grava ŝejko, sonis pafoj,
Brule spiris ruĝogriza ter',
Kaj sur felo de banataj ŝafoj
Gaje brilis akvo de river'.
En bazar' zorgemo sperte paŝis,
Tente logis nekutima kuk'.
La vizaĝojn eĉ knabinoj kaŝis

Per humila muzulmana tuk'.
Ĉu virin' memoras sian aĝon
En eterna laŭkorana spir'?
Jen ŝi malkovretis la vizaĝon:
Ja ne vidas ŝin eĉ unu vir'!
Sian prezidenton oni gloris
Per solena pompo de parad'.
Homoj dancis, preĝis kaj laboris,
Kiel en fabel' de Ŝarazad'.
Sen varmego, sen dolora ĝeno
Al mirakloj vokis la rutin'.
Mi neniam estis en Jemeno,
Sed hodiaŭ mi vizitis ĝin.

K.S.Ilutoviĉ (Elektrostalj)

Kruko revenas hejmen malfrue kaj konstatas ke la edzino estas malkontenta.

– Ĉu io ne estas en ordo? – li demandas ŝin.

– Jes, – ŝi respondas, provante ne plori. – Tio estas, ke hodiaŭ estas nia dudeka geedziĝa datreveno....

– Ho, sed vi pravas, karulino! – eksklamas Kruko, frapante sian frunton (sed ne tro forte...). – Mi verege treege bedaŭregas. Mi estas tiom okupata pro mia laboro, ke mi komplete forgesis. Nu, vestiĝu rapide! Hodiaŭ estas festotago, kaj ni eliros!

Lia edzino, ravita, metas vesperrobon, kaj ili ekiras al ŝika restoracio.

Je ilia alveno, la pordisto salutas ilin:

– Bonan vesperon, s-ro Kruko! Kiel vi fartas?

La ĉefkelnero alvenas haste:

– Bonan vesperon, s-ro Kruko, – li diras. – Via tablo estas rezervita.

S-ino Kruko estas mirfrapita:

– Ĉu vi ofte venas ĉi tien? – ŝi demandas.

– Ho, ofte, neofte, – respondas Kruko kaŝeme. – La direktoro estas amiko mia.

Post la vespermanĝo, ili decidas iri al kabaredo. La pordisto malfermas por ili la pordon kun granda rideto. Ene la kelnero alkuras por akcepti ilin:

– Bonan vesperon, s-ro Kruko. Bonvolu instaliĝi, oni tuj alportos al vi vian botelon.

– Ĉu vi venas ankaŭ ĉi tien? – denove demandas s-ino Kruko.

– Nu, fojfoje, kun klientoj... – jam iom nervoze respondas Kruko.

Sur scenejon venas striptizistino, kiu faras sian spektaklon. Je la fino, ŝi forprenas la pareeton kriante:

– Kaj la kalsoneto estas por kiu...?

Kaj la tuta ĉeestantaro entuziasme hurlas:

– Ĝi estas por s-ro Kruko!

S-ino Kruko furioze kritikaĉas sian edzon. Ili eliras la kabaredon forte disputante. En la taksio, ŝi daŭrigas la riproĉadon:

– Vi estas aĉegulo, rubaĵo, senhontulo...! – ŝi longe kriaĉas.

Post kelkaj momentoj la taksiŝoforo turniĝas kaj diras:

– Nu, s-ro Kruko, ni jam kondukis senĉastulinojn, vi kaj mi, eĉ tunojn da. Sed tiom ĉi tedaĉan ĝis nun neniam!

(esperanto-anekdotoj)

LIBRA REVUO

NOVA LIBRO



Rusa poezio en tradukoj de Sergej Rublov. A.S.Puŝkin – eld. "Remder", Jaroslavlj – 2002, 468 p.

En la pasinta jaro ni festis la centjaran jubileon de unu el la plej famaj sovetiaj E-poetoj Sergej Grigorjeviĉ Rublov (vidu la eseon pri li en REGo № 1(3), 2001). Nun lia filo, Vadim Sergejeviĉ Rublov, neesperantisto, mem kompostis kaj kun helpo de esperantistoj (aparte menciindas la redaktoro Valentin Melnikov) preparis por la eldono liajn tradukojn el rusa poezio. Ĵus aperis la unua volumo, dediĉita al la tradukoj el Puŝkin. Entute Sergej Rublov tradukis 133 verkojn de Puŝkin, el kiuj ĝis nun estis eldonitaj nur kelkaj negrandaj poemoj. La eldonitan volumon konsistigis 128 versaĵoj (de 1814 ĝis 1836), 3 fabeloj ("La fabelo pri popo kaj pri lia servisto Balda'", "La fabelo pri fiŝo kaj pri fiŝisto", "La fabelo pri ora koko"), 4 poemoj ("La fratoj-rabistoj", "La fontano de Baĥĉisaraj'", "Ciganoj", "La Kupra Rajdanto"), 3 Malgrandaj tragedioj ("La avara kavaliro", "Mocart kaj Salieri", "La ŝtona gasto"), "Boriso Godunov'" (fragmentoj) kaj "Eŭgeno Onegin". La libro haveblas ĉe la Libroservo de REU (vidu la adreson en la dua kovrilpaĝo). La prezo por rusianoj estas 90 rubloj plus sendokosto.

ORAJ KANTOJ – 3: REZULTOJ DE LA VOĈDONADO

Finiĝis la voĉdonado pri la kantoj por la tria muzikdisko el la serio "Oraj kantoj". Entute dum EoLA-14, per la reto kaj de la REGo-abonantoj estis kolektitaj 55 voĉdoniloj. Mi memorigas, ke necesis por ĉiu kanto en la proponita listo skribi iun ciferon de 1 ĝis 5 kun jenaj signifoj: **5** – "mi tre volas, ke tiu ĉi kanto eniru la diskon"; **4** – "mi ŝatus, ke tiu ĉi kanto eniru la diskon"; **3** – "por mi ne gravas, ĉu tiu ĉi kanto eniros la diskon aŭ ne"; **2** – "mi ne volas, ke tiu ĉi kanto eniru la diskon"; **1** – "mi ne konas la kanton". La rezultoj estas kalkulitaj laŭ du diversaj sistemoj: unue – laŭ suma kvanto de kolektitaj poentoj por ĉiu kanto; due – laŭ averaĝa poento, kiun la kanto ricevis de tiuj, kiuj ĝin konas. En la ĉi-sube prezentita listo la kantoj estas ordigitaj laŭ la unua sistemo, post ĉiu titolo videblas la suma kvanto de kolektitaj poentoj por la kanto. Poste en la krampoj aperas la rezulto laŭ la dua sistemo: la unua cifero montras la kvanton de la voĉdonintoj, kiuj ne konas la kanton; la dua – averaĝan poenton, kiun la kanto ricevis de tiuj, kiuj ĝin konas; la tria – la lokon, kiun la kanto okupis laŭ la dua sistemo.

1. Tumbalalajka – 208 (5 – 4.060 – 11)
2. Mia kara amik' – 206 (9 – 4.283 – 3)
3. Guantanamera – 204 (3 – 3.865 – 25)

4. Verda faetono – 202 (11 – 4.341 – 2)
5. Vi kaj mi – 201 (10 – 4.244 – 4)
6. Lulkanto – 199 (12 – 4.349 – 1)
7. Amataj, amitaj, amotaj – 196 (7 – 3.938 – 19)
8. Valso por amikoj – 196 (10 – 4.133 – 8)
9. Mariŝa, kisu min – 193 (2 – 3.604 – 45)
10. Kukolo – 188 (5 – 3.660 – 40)
11. Kanto de l' amikoj – 186 (5 – 3.620 – 43)
12. Mi sopiras – 183 (12 – 3.977 – 16)
13. Se vi ne ekzistus plu – 182 (13 – 4.024 – 14)
14. Ĉiu, ĉiu, ĉiu – 179 (13 – 3.952 – 18)
15. Apudmoskvaj vesperoj – 178 (3 – 3.365 – 62)
16. Ĉunga-ĉanga – 175 (5 – 3.400 – 59)
17. La Espero – 175 (8 – 3.553 – 49)
18. La vojo – 175 (13 – 3.857 – 26)
19. Nia trajno – 175 (17 – 4.158 – 7)
20. La kri' – 174 (9 – 3.587 – 46)
21. Mi ne volas foriri – 174 (12 – 3.767 – 32)
22. Letero – 172 (17 – 4.079 – 9)
23. La danco ĉe la fajro – 171 (19 – 4.222 – 6)
24. Hoj, knabino, bruas haj – 170 (11 – 3.614 – 44)
25. Novaj kondiĉoj – 168 (14 – 3.756 – 35)
26. Ĝis revido – 167 (16 – 3.872 – 24)
27. La pipo – 166 (12 – 3.581 – 47)
28. Jen mia mondo – 163 (18 – 3.919 – 20)
29. Dimanĉo – 162 (20 – 4.057 – 12)
30. Estas mi esperantisto – 162 (15 – 3.675 – 39)
31. Frua mateno – 162 (17 – 3.816 – 28)
32. Amazonka (tr.de S.Vajnblat) – 158 (18 – 3.784 – 31)
33. Adiaŭ, la Esperantujo – 156 (22 – 4.061 – 10)
34. Ta-ka-ta-ka, ta-ka-ta-ka – 155 (18 – 3.703 – 37)
35. Kvazaŭ sonĝo – 154 (22 – 4.000 – 15)
36. Klementine – 154 (15 – 3.475 – 57)
37. Marĝanĝa – 154 (16 – 3.538 – 50)
38. Kanto de krokodilo Gena – 153 (9 – 3.130 – 70)
39. Amazonka (vortoj de M.Bronŝtejn) – 150 (17 – 3.500 – 54)
40. Revis mi pri forir' – 150 (22 – 3.879 – 23)
41. Glori-glori-haleluja – 146 (18 – 3.459 – 58)
42. Turista kanto – 146 (25 – 4.033 – 25)
43. Vojo – 142 (22 – 3.636 – 42)
44. Brava bardo – 141 (26 – 3.966 – 17)
45. Vivo-viveto – 139 (29 – 4.231 – 5)
46. Kartvela kanto – 137 (25 – 3.733 – 36)
47. El malproksima helo – 136 (25 – 3.700 – 28)
48. Mi diras al ŝi – 136 (21 – 3.382 – 60)
49. Oĥ, fingret' vundita doloras – 136 (26 – 3.793 – 29)
50. Ĉokolado – 135 (19 – 3.222 – 67)
51. Ĝis revido, amikar' – 134 (27 – 3.821 – 27)
52. Tambura tango – 133 (27 – 3.786 – 30)

La 3-an de majo 2002 en Ulan-Ude estis fondita E-klubo "Smeraldo".

53. Ni pace iris kun amik' – 131 (21 – 3.235 – 64)
54. Pasis jam – 127 (30 – 3.880 – 22)
55. Pluvo kaj vent' – 125 (31 – 3.917 – 21)
56. Tendara tvisto – 124 (30 – 3.760 – 34)
57. Terpomo – 124 (24 – 3.226 – 66)
58. Ra-sa-sa – 122 (25 – 3.233 – 65)
59. Krokodilo – 120 (25 – 3.167 – 69)
60. Laŭ marĉo – 119 (28 – 3.370 – 61)
61. Granda sekret' – 116 (32 – 3.652 – 41)
62. Vi min konfuzigis – 116 (27 – 3.179 – 68)
63. Kafo, kafo, kafo – 115 (29 – 3.308 – 63)
64. En la tempoj de fama BET – 113 (34 – 3.762 – 33)
65. Radio verda – 110 (33 – 3.500 – 56)
66. Ĉe kafotablo – 108 (34 – 3.524 – 53)
67. Babelturo – 105 (35 – 3.500 – 55)
68. Gaja bebo – 103 (36 – 3.526 – 51)
69. Ho, ĉarmulin' de mia kor' – 103 (36 – 3.526 – 52)
70. Verda valo – 96 (39 – 3.563 – 48)

Surbaze de la rezultoj de voĉdonado estas elektitaj tridek kantoj, preparotaj por la registrado en oktobro 2002 en Tiĥvin. La provludoj por la registrado okazos en RET-02. Dudek kelkaj la plej sukcese registritaj kantoj konsistigos la diskon "Oraj kantoj – 3".

Garik Kokolija (Moskvo)

TUTMONDA FABELKONKURSO INVITAS INFANOJN VERKI

Paatalo-Instituto estas verkista edukcentro en Taivalkoski, Norda Finnlando. Ĝi estas nomita laŭ Kalle Paatalo, eminenta verkisto, kiu naskiĝis en Taivalkoski. Unu el la agadoj de la Instituto estas fabelkonkurso por finnaj infanoj, kiu okazas ĉiujare jam ekde 1994.

En 2000 la Instituto eksperimente aldonis al la konkurso Esperantlingvan branĉon laŭ iniciato de la Vilaĝa Asocio de Metsäkyla, unu el la vilaĝoj en la komunumo Taivalkoski. Pro bonaj spertoj ĝi estis ripetita en 2001, kiam UEA aŭspiciis ĝin kaj donacis libropremiojn al la gajnintoj. En ambaŭ fojoj finnaj gazetoj multe raportis pri la Esperanta branĉo.

Ankau ĉi-jare la konkurso havas Esperanto-branĉon, kiu denove okazas sub aŭspicioj de UEA. Rajtas partopreni infanoj el la tuta mondo, kiuj scipovas aŭ ankoraŭ studas Esperanton.

En la konkurso estas tri kategorioj: A (infanoj ĝis 9-jaraj), B (10-11-jaraj), C (12-14 jaraj). La konkursaĵoj povas esti verkitaj de individuaj infanoj aŭ de grupoj (ekz. lernejaj klasoj). Individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksitaj aparte. La longo de la konkursaĵoj ne estas fiksita. La ĵurio aprezas la fabelecon kaj originalecon de la verkaĵo. En la skribado aŭ tajpado plenkreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco.

La ĉefa celo de la konkurso estas, ke geknaboj interesiĝu pri la uzado de la lernita lingvo, daŭrigu sian bonan hobion kaj ekzercu sian kreivon.

La konkursaĵoj devos atingi la organizanton plej laste la 20-an de septembro 2002. Oni adresu ilin al: Paatalo-Instituto, PL 39, FI-93401 Taivalkoski, Finnlando.

Oni skribu sur la koverto la vorton "Fabelkonkurso". Oni uzu pseŭdonimon kaj menciu, ĉu la konkursanto estas grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso de la konkursanto estu en aparta koverto.

Pli da informoj oni povas ricevi de la komisiito de la Instituto pri la konkurso: Aini Vaaraniemi, Vaarajarventie 26A, FI-93590 Vanhala, Finnlando; rete: <aini.vaaraniemi@pp.inet.fi>.

La hejmpaĝo de la Instituto estas <http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti> kaj ĝia retadreso estas <instituutti@taivalkoski.fi>. Pri la fabelkonkurso bv. tamen korespondi nur kun la komisiito (vd. supre). La direktoro de la Instituto estas Osmo Buller.

(ret-info)

IRONIA VOĈO DE KALUGANO V.Ĉ.

En la "lulilo de kosmonaŭtiko", la urbo Kaluga, nia samideano Vladimir Ĉernov kolektis kaj eldonis la libreton "1000 kalugaj humuraĵoj". Verkita en la rusa lingvo, la libreto tamen enhavas informon pri la internacia lingvo kaj ioman tekston en Esperanto. La aŭtoro havas intencon aperigi libron kun "Anekdotoj, ŝercoj, proverboj de diversaj popoloj pri urboj kaj ties loĝantoj, naciaj moroj kaj kutimoj, interkompreniĝo kaj malkompreno". Li bezonas esperantistan kunlaboron por realigi la projekton. Ĉiu, kiu volas kontribui kaj sendi la humuraĵojn al Vladimir Iljiĉ Ĉernov, bonvolu kontakti lin, la adreso estas str.Georgievskaja 18 – 47, 248600 Kaluga; la telefonnumero – (08422) 43606.

PREMIO NAPOLO 2002

Napola Esperanto-Asocio lanĉas por la internacia Esperanta publiko la konkurson "Premio Napolo 2002" pri la temo "Napolo laŭ rememoro kaj fantazio", kunlabore kun la "Napola Unesko-klubo" kaj la "Napola Kultur-centro COSMOPOLIS". La premio strukturiĝas laŭ jenaj du sekcioj: A) LITERATURO – poezio kaj prozo; B) BILDARTO – desegno aŭ pentraĵo. La poeziaĵoj, prozaĵoj (noveloj/rakontoj), desegnoj kaj pentraĵoj iel pritraktu, laŭ aŭtoraj propraj rememoroj kaj imagivo, iun temon ligitan al la urbo Napolo kaj/aŭ ties ĉirkaŭaĵoj. Por ĉiu esperantisto eblas partopreni en nur unu el la du sekcioj per maksimume 2 konkursaĵoj. Ĉiu konkursanto sendu: por la sekcio A – 2 kopiojn de poeziaĵo aŭ prozaĵo en Esperanto; por la sekcio B – la originalon de ĉiu desegno aŭ pentraĵo (maksimuma formato estas 50×70cm). Ĉiu konkursaĵo estu subskribita per pseŭdonimo. Oni aldonu, en fermita pseŭdonime markita koverto, slipon kun antaŭnomo, familia nomo, adreso kaj eventuale telefonnumero kaj/aŭ retadreso de la konkursanto. La adreso por sendi la konkursaĵojn estas: Napola Esperanto-Asocio, Via Pietro Castellino 115, 80131 Napoli, Italio.

Ju pli ni lernas, des pli ni scias.
Ju pli ni scias, des pli ni forgesas.
Ju pli ni forgesas, des malpli ni scias.
Ju malpli ni scias, des malpli ni forgesas.
Ju malpli ni forgesas, des pli ni scias.
Kial do lerni?



redaktas Grigorij Arosev
la rubriktitolon desegnis Jelena Katajeva

"Ekstaru, frato!" – duonpreĝe ekkriis mi.
– Frato? – diris li. – Kies frato? –
kaj forigis kapuĉon de la vizaĝo.

Tatjana MUĤAMEDŜINA
(Ĥarjkov, Ukrainio)

Ukrainisto (specialisto pri la ukraina lingvo kaj literaturo). Laboras en la eldonejo "Prosvita" kiel korektisto. Esperantisto ekde 1980, kaj tuj post la kursofino komencis asisti al kursgvidantoj. Multe laboras por nevidantaj esperantistoj, kunpreparas la kvaronjaran revuon por nevidantoj "Viburno", kiun oni legas ne nur en Ukrainio, sed vaste tra la mondo. En 1997 kunorganizis (apud Kievo) kaj prezidis Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj.

GIORDANO BRUNO
(fragmento)

ĉi tiu verko gajnis la unuan lokon en la branĉo "Originala poezio"
kadre de la literatura konkurso "Saliko"

I.

Jes, mi memoras... Gardas la spirito
Memoron de l' abelo kaj tili',
Kaj antaŭ la rigard' de novnaskito
Flugilon blankan de la papili',
Aŭ de l' anĝel'... Memoron, sed ne scion
Zorgeme gardas, vartas mia kor',
Ke fine ĝi alvenu la konscion
Por min konsoli dum ĉi-lasta hor'.
La horo lasta... Antaŭ la eterno
De l' vivo, de la steloj, de l' eter'
Ĉu gravas la momento de l' sufero
Sur ŝtupareto glita – nia ter'?

II.

Ho, kiom bruas homamas' tedema!
Ĝi trovis tempon por malbeni min!
Ĉu venis por aŭskulti la Te Deum?
Eĉ se inferon iros la anim',
Ĝin oni kantas... La espero vana
Pri l' paradizo – savo de l' turment',
Pri la senpensa sonĝo en Nirvano...
Sub kovro de l'solida firmament'.

III.

Solida... Strange, ĉu tasegoj viaj
De kies ŝtonoj vin atingos ĝem'
De via preĝ', sendita al la Dio
(Mirigas, tamen, strebo al subprem'),
De l' enŝtonigo la deziro stranga...
Ĉu vin ne logis, vokis horizont',
Mistera, nekonata tera rando,
Ŝajninta esti post najbara mont'
Kaj deiranta je la paŝo unu
Nur por fariĝi sonĝo, ĉu delir'
De la revant' pri radieto suna,
Ke ĝi briligu kradon dum subir'...

Gafur GAZIZI

(Salavat)

G.Gazizi estas "simpla laboristo" (laŭ liaj propraj vortoj) el Baŝkirio, jam de longa tempo ne aktivanta en Esperantujo, sed verkanta poeziaĵojn. En 1996 liaj poemoj (kune kun tiuj de V.Ĉaldajev, A.Kris kaj N.Lozgaĉev) kunkonsistigis la konatan libron "Kvarteto". Estas aparte interese aŭskulti, kiel Gafur mem voĉlegas siajn verkojn. Ĉi-jare li vizitis la festivalon EoLA, kie akiris novajn amikojn, kaj estis inspirita je ĉi-sekvaj versaĵoj. La teksto estas prezentata sen ajna ŝanĝo, kiel ĝin sendis la aŭtoro.

1. FABLOJDO[1] DE "VIAGRA"

Ŝatas mi promeni strate,
ĉar en viv-amasa denso
al mi venas delikate
por poemoj krea penso.
Vigle vivas la urbanoj
eĉ afabli ofte penas.
Ĉiu havas gravajn planojn,
ĉies kapo biznes-plenas.
Ankaŭ mi, poeto magra,
okupitas serioze.
Mi matene per "Viagra"
ŝargis min sufiĉa-doze.
Nun alude al virinoj
mi rigardas kun bravemo,
en la kapo flataj rimoj
"vorkas" je l' invit'-poemo.
Post promeno tra la tago,

[1] Fablojdo – io simila al fabloj de Krilov + tablojdo (rim. de la aŭtoro)

ŝajne, al vesper' proksime,
mi, finfine, en l' imago,
kreas ion tre sublime.
Jen rezultis, mi ne blagas,
vervaj versoj – pli ol kvindek,
la metion mi ja fakas
kiel majstro, enviinde.
Tuj mi venas en ĉi strofo
pruvi, kion mi sukcesis,
sed... okazis katastrofo:
miajn versojn mi...
forgesis.
Do, finiĝis la valido
de l' rimedo aktiviga.
Ne plu tiras min libido
al in-spiro erotika.

* * *

Moralo bona jenu:
paperon ĉiam prenu,
kaj plumon ne forgesu!
Mem-oron fidi ĉesu!

2. <...>

3. apstrakŝn

polifonia komponaĵo por la koncerto kun violonda ĝazabundo plenumas ***Ĝazizi*** *dediĉe al* ***Sergeo BOZINI***

s-s-s-s
sono-suno. sono-sano
sono-sino de la kano
kano kantas
kano konas
mia koro kune sonassss
la kurajo – la kuraĝo
kuras sur la langa
longa
lingva kaĉo de la saĝo
aĝo scias
iĝ' socias
ligas logas
lege sias
lasi sali
se li solas
ŝi la lokon ŝik-konsolas
kol' kon-servas
verso vere sure revas

vire vervas ree nervas
rave levas male mavas mile movas mole
mevas mire moras maro rimas kun amaro
kaj amor' aromas same
sume semas muso masas
la amaso amon mesas ... mis ...
jes, simil simil-lamas limas lumas lunas
sunas /// keno kinas // kuro junas
rojo rajo jaro juro en aero
aro ero iro oro uro
su – su – su – su – su – su – su – ro
en rumoro (morrarum)
run – ran – ren
ronron –
ron – ron – ron – ron – ron – ron – ron –
ŝiras son' – sonas ŝir' ŝi –
ŝi – ŝi – ŝi – ŝŝ – ŝ – ŝ – ŝ – ss – s – s – s...

4. KISU MIN...

Kisu min, mi ege petas
kisu min, amata mia,
kisu min, la koro pretas
doni min al fajro via.

Kisu min per tuta korpo.
Volas sveni kaj frenezi
mi en via kis-absorbo,
mi ne devas vin forgesi!

Kisu kisu kisu, kara,
la miraklon mi soifas.
Mia dolĉa kaj amara,
nur por via kis' mi vivas!

Studento venis al sia onklo en vilaĝon. Nekutima al eksterurba vivo, li ekenuis. La onklo, vidante tion, proponas al li:
– Eble vi prenu hundojn, fusilon kaj iru al la arbaro por iom amuziĝi per pafado?
La studento ekinteresiĝis, faris tiel. Post unu horo li, ĝoja kaj energiplena, revenas hejmen kaj diras al la onklo:
– Bonege! Interesega pafado! Ĉu vi havas pliajn hundojn?

Versaĵoj de Vladimir NABOKOV



AL RUSIO

Sur mia polmo la naturo
patrujon mapis: ĉiu voj'
envejnas jen en hasta kuro,
ĉiu rivero, ĉiu roj'.

La brakojn blinde mi etendas
kaj ĉion surplanede sentas
pere de vi, ho mia land'.
Do, mi feliĉas super rand'.

Mi sonĝe vidis dum aŭroro
(ĉu tiu sonĝo estas ver'?),
ke mia lasta vivohoro
min trovos en fremdlanda ter',

sur la lerneja tabl' dekliva
vin lasos mia man' senviva.
Volviĝos mapsimile vi
kaj falos, kie falos mi.

1928
tradukis M.V.Povorin

NOKTO

Kiam radiojn nur etendos frua lun',
leviĝas la muzik' alvene...
Ruliĝu, l' arĝenteca, tondru nun
inspirvekante, forte, plene!

Laŭ klavoj de la lum' la nevidebla man'
kaj de la ombroj ĝis aŭroro glitas,
la viglon perdas en dormiga diafan'...
Jen lasta son' – kaj nokto finkantitas...

1921
tradukis M.C.Bronŝtejn

HEKSAMETROJ

Memore al V.D.Nabokov[1]

Mort' estas strio matena, printempa vekiĝo. Mi kredas,
vi, en la tombon metita, vi, revekita, libera
paŝas, kaŝite brilante, nun, inter ni – ĝis temp' certa dormantaj...
Klinu vi vin super mi, aŭdu mian sonĝon –
sonĝas mi larmojn, sonĝas mi kantojn, sonĝas mi preĝojn...
Dormas mi, brakojn disigis, vizaĝe al steloj,

[1] La patro de V.V.Nabokov, murdita en Berlin la 28-an de marto 1922.

l' sonĝon enfluas flagranta lum', diafanas do
eĉ miaj malĝojoj...
Mi sentas: vi paŝas proksime,
vidas dormantojn. Vent' via kisas tenere l' palpebrojn,
ion dumdorme mi flustras: vi klinu vin, kaj tuj vi aŭdos
nomon tre svagan, – pli klaran ol ploro, pli dolĉan
ol mondaj kantoj, pli saĝan ol preĝo – de la Patrio.

1923
tradukis G.L.Arosev

DUM AŬRORO

Al putinoj montris viajn fotojn
mi. L' taverno tremis, flosis for.
Urb' mizera malsekigis botojn.
Mi survojis hejmen je aŭror'.

Iu razis sin ĉe lumigita
fenestreto, sonis la lament'
de unua tram'. Kaj infinita
mateniĝ-kolora firmament'.

La dolor' etendis la radiojn,
iris al humido, al ĉiel'.
Sentis nuda gorĝo konvulsiojn
de la frakasita vitra ŝel'.

Mallumiĝis fenestret' post la razo.
Venas tag' labora, pala splen'.
En la sang' plu rojas ŝia frazo:
"Iru for", ŝi diris, "Sen reven'".

Ie gutis krano. Ŝi ripetis:
"Sen reven'", haltinte por minut'.
Svene, tre mallaŭte, ŝi glitetis
sur la plankon, kvazaŭ akvogut'.

08.02.1924, Berlin
tradukis G.L.Arosev

KUBOJ

La vizioj faldu la alojn.
Nokt'. Per anguloj la domoj premas
domojn. Ŝiras la ombrajn vualojn.
Lantern' – flam' rompita tremas.

Falĉas en tiu ĉambro ligna vento
meblon. Kaj la febla spegul' perdas
tablon, oranĝojn sur la pleto.
Kaj vizaĝo mia bluverdas.

Vi – nigrarobe, la flug', poemo

nigroangula en mond' kolora.
Via akra genu', la funebra teoremo,
premas al plafono fora.

En la mond' timiga, ne nia, Dio,
vortojn, frazojn de vivonovelo
mislokis la kompostistoj por io.
Faldu ni alojn, anĝelo.

1924
tradukis O.V.Dadaev

per publikigo de ĉi tiuj versaĵoj ni finas la serion de tradukoj el Nabokov

Ray BRADBURY [rej bredberi]

R.Bradbury (1920) estas usona verkisto, tutmonde fama per siaj verkoj "La marsaj kronikoj", "451 gradoj F", "Vino el leontodoj", multegaj rakontoj. Ĉi-sube estas traduko de lia ne tre vaste konata rakonto, originale titolita "The One Who Waits". (NB! Prononcoj de personaj nomoj kaj klarigoj de (kursivigitaj) anglaj esprimoj estas fine de la rakonto.)

MI ATENDAS...

Mi vivas en puto. Mi vivas kiel fumo en la puto. Kiel vaporo en ŝtona gorĝo. Mi ne moviĝas. Mi faras nenion, nur atendas. Supre mi vidas malvarmajn stelojn de nokto kaj mateno, kaj mi vidas sunon. Kaj sporade mi kantas oldajn kantojn de ĉi tiu mondo, de ĝia juneco. Kiel mi povus klarigi kio mi estas, se mi mem ne scias? Mi ne povas. Mi simple atendas. Mi estas nebulo kaj lunlumo kaj memoro. Mi estas trista kaj mi estas olda. Sporade mi pluvece falas en la puton. Ringoj kovras la surfacon de la akvo, simile al araneaj retoj, kie mia pluvo falas rapide. Mi atendas en la malvarma silento kaj venos la tago kiam mi ne plu atendos.

Venas mateno. Mi aŭdas enorman tondron. Mi flaras flamon el malproksimo. Mi aŭdas knaron de metalo. Mi atendas. Mi aŭskultas.

Voĉoj. Lontane.

– Ĉio 'stas en ordo!

Unu voĉo. Fremda voĉo. En fremda lingvo, kiun mi ne povas scii. Eĉ ne unu vorto estas konata. Mi aŭskultas.

– Sendu la homojn eksteren!

Kraketo en kristala sablo.

– Marso! Jen fine ĝi estas!

– Kie estas la flago?

– Ĉi tie, *sir*.

– Bone, bone.

La suno estas alte en blua ĉielo kaj ĝiaj oraj radioj plenigas la puton kaj mi nubas kiel flora poleno, nevidebla kaj nebulanta en la varma lumo.

Voĉoj.

– Je la nomo de la Tuttera Registaro mi proklamas la ĉirkaŭaĵojn esti la Marsa Teritorio, egale dividenda inter la membrantaj nacioj.

Kion ili diras? Mi turniĝas en sunlumo, kiel rado, nevidebla kaj pigra, ora kaj senlaca.

– Kio estas tie?

– Puto!

– Ne!

– *Come on*! Jes!

Alproksimiĝas varmeco. Tri objektoj sin klinas super la puta buŝo kaj mia malvarmo leviĝas al la objektoj.

– Neimageble!

– Ĉu vi opinias ke la akvo estas bona?

– Vidu ni.

– Iu ajn, alportu provtubon kaj ŝnuron.

– Mi tuj!

La sono de kurado. Reveno.

– Jen ĝi estas.

Mi atendas.

– Malsuprenigu ĝin. Akurate.

Vitro brilas supre, irante suben, pendante sur malrapida ŝnuro.

La akvo kovriĝas per ondetaro kiam la tubo tuŝas ĝin kaj pleniĝas. Mi supreniras tra varma aero, supreniras al la puta buŝo.

– Jen ĝi estas. Ĉu vi volas esplori la akvon, Regent?

– Momenton...

– Kia belega puto. Rigardu la ŝtonojn. Kiom olda ĝi povas esti?

– Dio scias. Kiam ni surgrundiĝis hieraŭ en tiu alia urbo, Smith diris ke la vivo en Marso ne ekzistis dum deko da jarmiloj.

– Kiaj rezultoj, Regent? Pri la akvo.

– Pura kiel arĝento. Gustumu.

La sono de akvo en varmega sunlumo. Nun mi ŝvebas kiel polvo, kiel cinamo, apoge de trankvila vento.

– Kio okazis, Jones?

– Mi ne scias. Terura kapdoloro. Tute subite.

– Ĉu vi trinkis la akvon?

– Ankoraŭ ne. Tio estas io alia. Mi klinis min super la puta rando kaj subite mia kapo eksplodis. Nun mi fartas pli bone.

Nun mi scias, kiu mi estas.

Mia nomo estas Stephen Leonard Jones kaj mi estas dudekkvin-jara kaj mi estas ĵus veninta per raketo el planedo nomata Tero, kaj mi staras inter miaj bonaj amikoj Regent kaj Shaw apud antikva puto en la planedo Marso.

Mi rigardas malsupren, al miaj fingroj, oraj kaj fortaj. Mi rigardas miajn longajn krurojn kaj mian arĝentan uniformon kaj miajn amikojn.

– Kio okazis al vi, Jones? – diras ili.

– Nenio, – mi diras, rigardante ilin. – Tute nenio.

La manĝaĵo estas bona. Pasis jam dek jarmiloj post la lasta manĝo. Ĝi tuŝas ĝentile la langon, kaj la vino varmigas. Mi aŭskultas la sonon de la voĉoj. Mi kunmetas la vortojn kiujn mi ne komprenas, sed iamaniere komprenas. Mi gustumas la aeron.

– Kio okazis, Jones?

Mi klinas la kapon flanken kaj metas la manojn, tenantajn la arĝentan manĝilaron. Mi sentas ĉion.

– Pri kio vi parolas? – diras ĉi tiu voĉo, mia nova voĉo.

– Vi spiradas strange. Tusas, – diras la alia.

Mi klare prononcas:

– Eble mi iom malvarmumis.

– Kontrolu vin poste ĉe la doktoro.

Mi kapjesas kaj tio estas bona – kapjesi. Estas bone fari kelkajn aĵojn post dek jarmiloj. Estas bone enspiri freŝan aeron kaj estas bone senti la sunon profunde en la karno, penetrantan pli profunde, kaj estas bone senti la eburan strukturon kaj fortan skeleton, kaŝitan en varmanta karno, kaj estas bone aŭdi sonojn pli klare kaj senprokraste ol ili estis en la ŝtona sino de la puto. Mi sidiĝas, fascinita.

– Revenu, Jones, vekiĝu. Ni devas iri!

– Jes, – diras mi, hipnotita per la sento, ke la vorto formiĝas kvazaŭ akvo sur la lango, kaj elfalas aeren en senhasta beleco.

Mi iras, kaj iri estas bone. Mi staras plenalte kaj la grundo ŝajnas esti tiom malproksima, kiam mi rigardas ĝin de la nivelo de miaj okuloj kaj kapo. Tio estas kvazaŭ loĝi sur bela alta roko kaj esti feliĉa tie.

Regent staras apud la ŝtona puto, rigardante malsupren. La ceteraj jam estas foririntaj al la arĝenta ŝipo, el kiu ili venis.

Mi sentas la fingrojn de mia mano kaj rideton de miaj lipoj.

– Ĝi estas profunda, – diras mi.

– Jes.

– Ĝi nomiĝas la Puto de Animoj.

Regent levas la kapon kaj rigardas min.

– De kie vi scias?

– Ĉu ĝi ne estas simila al tiu?

– Mi neniam aŭdis pri la Puto de Animoj.

– La loko kie la aĵoj estas atendantaj, la aĵoj, kiuj iam havis karnon, ili atendas kaj atendas, – diras mi, tuŝante lian brakon.

La sablo estas fajro kaj la ŝipo estas arĝenta fajro en varmego de la tago kaj estas bone senti la varmegon. La sono de mia paŝo sur malmola sablo. Mi aŭskultas. La sono de vento kaj suno, bruliganta la valojn. Mi flaras la odoron de la raketo, bolanta en meztago. Mi staras apud la descendilo.

– Kie estas Regent? – demandas iu.

– Mi vidis lin ĉe la puto, – respondas mi.

Unu el ili kuras al la puto. Mi komencas tremi. Delikata, haŭtojuka tremo, profunde kaŝita sed pli kaj pli fortiĝanta. Kaj por la unua fojo mi aŭdas ĝin, kvazaŭ ankaŭ ĝi estus profunde kaŝita en puto. Iu voĉo, kiu vokas interne de mi, eta kaj timigita. *Ellasu min, ellasu min*, kaj aperas la sento, ke io provas liberiĝi, frapiĝas kontraŭ la pordoj de labirinto, kuranta supren kaj suben en malhelaj koridoroj, eĥe reflektata kaj kriĉanta.

– Regent estas en la puto!

La homoj kuras, ĉiuj kvin. Mi kuras kun ili, sed mi aĉe fartas, kaj la tremo jam furiozas.

– Li, ŝajne, falis en la puton. Jones, vi estis kun li. Ĉu vi vidis ion? Nu, parolu, Jones!

– Kio okazis al vi, Jones?

Mi surgenuiĝas, la tremo estas jam tro forta.

– Li malsanas. Venu, helpu min!

– La suno.

– Ne, ne la suno, – murmuras mi.

Ili streĉas min kaj la atakoj revenas kaj ŝajnas jam tertremoj, kaj la voĉo kaŝita profunde interne de mi kriĉas: "*Jen estas Jones, jen estas mi, tio ne estas li, tio ne estas li, ne kredu*

lin, ellasu min, ellasu min!" Kaj mi rigardas la klinitajn figurojn kaj miaj palpebroj tremetas. Ili tuŝas miajn pojnojn.

– Lia koro malakcelas.

Mi fermas la okulojn. La kriĉoj ĉesas. La tremo ĉesas.

Mi leviĝas, kvazaŭ en malvarma puto, liberigita.

– Li mortis, – diras iu.

– Jones mortis.

– Pro kio?

– Ŝoko, almenaŭ tre similas al ŝoko...

– Kia ŝoko? – demandas mi, kaj mia nomo estas Sessions, kaj miaj lipoj moviĝas abrupte, kaj mi estas kapitano, estro de ĉi tiuj homoj. Mi staras inter ili kaj rigardas la korpon, kiu kuŝas, malvarmiĝante, sur la sablo. Mi kaptas la kapon per ambaŭ manoj.

– Kapitano!

– Nenio serioza, – elkrias mi. – Simple kapdoloro. Ĉio estos bone. Jen, jen, – flustras mi. – Mi jam estas en ordo.

– Ni prefere foriru de sub rekta sunlumo, *sir*.

– Jes, – diras mi rigardante al Jones. – Ni prefere neniam venus ĉi tien. Marso ne akceptas nin.

Ni portas la korpon al la raketo, kaj nova voĉo vokas elinterne, petegas esti liberigita.

Helpu, helpu. Lontane, profunde, en la plej makabraj tomboj de la korpo. *Helpu, helpu!* en ruĝa abismo, eĥante kaj petante.

La tremado komenciĝas pli rapide en ĉi fojo. La kontrolo estas malpli forta.

– Kapitano, vi prefere ŝirmiĝu de la sunlumo, vi aspektas ne tre bone, *sir*.

– Jes, – diras mi. – Helpu, – diras mi.

– Pardonu, *sir*?

– Mi nenion diris.

– Vi diris 'Helpu', *sir*.

– Ĉu vere, Matthews, ĉu vi ne eraras?

Ni metas la korpon en la ombron de la raketo kaj la voĉo kriĉas en senfundaj subakvaj katakomboj de ostoj kaj skarlata tajdo. Miaj manoj dancas. Mia buŝo estas seka kaj krakinta. Miaj naztruoj vaste malfermiĝas. Miaj okuloj rotacias. *Helpu, helpu, ho, helpu, ho, ne, lasu min, ne, ne.*

– Ne, – diras mi.

– Pardonu, *sir*?

– Ne atentu, – diras mi. – Mi devas liberiĝi, – diras mi. Mi ŝtopas la buŝon per la mano.

– Pri kio vi parolas, *sir*? – krias Matthews.

– Iru en la raketon, vi ĉiuj, reen, al Tero! – kriegas mi.

Pistolo estas en mia mano. Mi levas ĝin.

– Ĉesigu, *sir*!

Eksplodo. Ombroj dancas. La kriĉo mortis. Aŭdeblas fajfa sono de falo trans spaco.

Kiom bone estas morti post dek mil jaroj. Kiom bone estas senti subitan malvarmon, malstreĉiĝon. Kiom bone estas kvazaŭi manon en ganto kiu estas streĉita kaj kreskas mirakle malvarma en varmega sablo. Ho, kvieto kaj plezuro de ensorbanta, obskuranta morto. Sed mi ne plu povas prokrasti.

Krako, klako.

– Dio mia, li mortigis sin! – mi krias kaj vaste malfermas la okulojn, kaj vidas la kapitanon kuŝantan apoge al la raketo, lia kranio estas frakasita per la kuglo, lia lango pendas inter la blankaj dentoj. Sango fluas el lia kapo. Mi klinas min kaj tuŝas la korpon.

– Stultulo, – diras mi. – Pro kio li faris tion?

La homoj estas teruritaj. Ili staras apud la du kadavroj kaj turnas siajn kapojn por vidi la marsajn sablojn kaj lontanan puton, kie Regent kuŝas, lulata en profunda akvo. Raŭkoj falas de sur iliaj lipoj, histeria, infaneca protesto kontraŭ ĉi tiu kruela sonĝo.

La homoj sin turnas al mi.

Post longa paŭzo unu el ili diras:

– Tio faras vin la Kapitano, Matthews.

– Mi scias, – malrapide diras mi.

– Ni restis nur sesope.

– Sankta Dio, ĝi okazas tiom rapide!

– Mi ne volas resti ĉi tie, foriru ni!

La homoj tumulte bruas. Mi aliras ilin kaj nun mi tuŝas ilin, kun la konfido preskaŭ kantanta ene de mi.

– Aŭskultu, – mi diras kaj tuŝas iliajn kubutojn, aŭ brakojn, aŭ manojn.

Ni ĉiuj samtempe eksilentas.

Ni estas unu.

Ne, ne, ne, ne, ne, ne! Internaj voĉoj krias, profunde entombigitaj, prizonigitaj sub ĉio ekzistanta.

Ni rigardas unu la alian. Ni estas Samuel Matthews kaj Raymond Moses kaj William Spaulding kaj Charles Evans kaj Forrest Cole kaj John Summers, kaj ni diras nenion, nur rigardas unu la alian, rigardas al niaj blankaj vizaĝoj kaj tremantaj manoj.

Ni turnas nin, kvazaŭ unu homo, kaj rigardas al la puto.

– Nun, – diras ni.

Ne, ne, kriĉas ses voĉoj, kaŝitaj kaj entombigitaj, stokitaj por ĉiam.

Niaj kruroj paŝas sur la sablo kaj tio similas dekdufingran manon, moviĝantan sur la fundo de varmega maro.

Ni klinas nin kontraŭ la puta rando, rigardante malsupren. El malvarma profundo ses vizaĝoj rigardas al ni.

Unu post la alia ni klinas nin ĝis malapero de ekvilibro kaj unu post la alia falas en la gorĝon kaj malsupren, tra valvarma obskuro en la fridan akvon.

La suno subiras. La steloj rotacias en la nokta ĉielo. Malproksime briletas lumo. Venas alia raketo, ruĝmakulante la spacon.

Mi vivas en puto. Mi vivas kiel fumo en la puto. Kiel vaporo en ŝtona gorĝo. Supre mi vidas malvarmajn stelojn de nokto kaj mateno, kaj mi vidas sunon. Kaj sporade mi kantas oldajn kantojn de ĉi tiu mondo, de ĝia juneco. Kiel mi povus klarigi kio mi estas, se mi mem ne scias? Mi ne povas.

Mi simple atendas.

<u>NOTOJ</u>

1. *sir*: en anglalingvaj landoj la sinturno de subulo al la estro, i.a. de soldato aŭ oficiro al oficiro de pli alta posteno.
2. *come on*: en Usono – malfacile tradukebla alvoko: “iru, rapidu, ne hezitu”.
3. proksimuma prononco de la personaj nomoj: Regent – [ri<u>ĝ</u>ent], Stephen Leonard Jones – [stivn l<u>e</u>nad ĝoŭns], Sessions Shaw – [seŝnz ŝoŭ], Samuel Matthews – [s<u>e</u>mjuel m<u>e</u>tjuz], Raymond Moses – [r<u>e</u>jmand m<u>a</u>zes], William Spaulding – [ŭ<u>i</u>ljem spoldin], Charles Evans – [ĉalz <u>i</u>vanz], Forrest Cole – [f<u>a</u>rest koŭl], John Summers – [ĝon samerz]

el la angla tradukis Aleksej GULJAEV (Taganrog)

La 17-an de aprilo nokte en Volgogrado, en sia loĝejo per pulvopafilo estis murdita MIĤAJLOV-familio. Pereis ALEKSANDR, NADEĴDA kaj ilia filino POLINA – denaska esperantistino.

Kies mano leviĝis?… Iam en Rusio ekzistis Familiaj Renkontiĝoj – por la gepatroj kun etaj gefiloj. Miĥajlov-familio ĉeestis plenkonsiste. Polinka estis tre aĝa – 5-jara! Kaj mia Svetka havis nur tri. Polina estis alta, maldika, kun longaj blondaj haretoj – tre simila al la paĉjo. Svetka ŝajnis apude pufeta, malgranda, kun malhelaj haroj buklaj. Ŝi estimis Polinan kiel pli aĝan. Ili ofte ludis kune – estis la plej bonaj amikinoj... Kiam mi renkontis Polinan en la Ivanova OkSEJT antaŭ du jaroj, mi estis ravita: kreskis matura, serioza movadanino. "Jen kie estas la estonteco de nia junulara movado, – pensis tiam mi. – En Volgograd..." Kaj kiel ŝi rolis en la spektakloj, ĉu vi memoras? Kia Eŭridica ŝi estis!!!... Nekredeble... Nadja tiam – kaj ĉiam – ĉarmis min per sia beleco. Ŝajne, la jaroj tute ne tuŝis ŝin. Ĉiam bela, svelta, ridetanta. Kion diri pri Aleksandr? "Umnica". Saĝa, trankvila, racia, bonkora. Modela edzo kaj patro... En amuza masko de porkido dum la infana karnavalo... Trankvilecon, sanon, harmonion, feliĉon elradiis tiu familio. Kies mano leviĝis?...

Irina Gonĉarova (Odincovo)

FIŜETO

Memore al Polina (fiŝeto – ŝia donaco)

Fiŝeto pendas ĉe la bret'...
Nenion povas ajnaj vortoj.
Mi ĵus komprenis: sur la Ter'
Ne ĉiam eblas resti forta.
En mondo de kruel' kaj kot'
Maloftas puro kaj sincero.
Sen via varmo kaj bonkor'
Ne tiom brilas Verda Stelo.
Decidas ĉion kosma vol'–
Sencerba, senanima esto.
Doloro mankas plia ol
Parol' pri l' karaj en paseo.

Anim' ne restas en la grund'.
Kaj eble foje ĉe fenestro
Mi vin rekonos en hirund'
Forrapidanta al la nesto.
Mi volas kredi, ke Senfin'
Brakumis vin kaj lulas milde.
Neniu plu certigu min,
Ke en ĉielo vivas dio
Decidas ĉion kosma vol'–
Sencerba, senanima esto.
Teruro mankas plia ol
Parol' pri l'karaj en paseo.

(la aŭtoro de la versaĵo deziras resti nekonata)

Unu el la plej popularaj en Eŭropo junularaj E-aranĝoj sendube estas **Internacia Junulara Festivalo** (IJF), kiun ĉiujare printempe organizas Itala Esperantista Junularo. Ĉijare la festivalo okazis en loko Prà Catinat (Fenestrelle, proksime de Torino), en ĝi partoprenis 155 geesperantistoj (kaj, certe, ne nur gejunuloj).

La programo de IJF similas al programo de aliaj eŭropaj junularaj E-aranĝoj, precipe al tiu de IS. Tagaj kaj des pli matenaj programeroj kolektas malmultajn partoprenantojn (okazas ke al iu aranĝo eĉ neniu venas). Sed pli proksime al vespero la vivo pliviglîĝas. Ege popularas malfruvesperaj bierumadoj, dancadoj kaj paroloj-diskutoj ĉe biero (en bierejo) aŭ teo (en t.n. gufujo). Ĉefa diferenco de IJF estas ĝia gaje-vigla kaj spontaneca karaktero, aperinta pro similaj trajtoj de italoj. Ĉi-foje aparte ravis min (kaj aliajn partoprenantojn) la ĉirkaŭa naturo. La IJF-ejo situis en montara naturrezervejo. De la balkonoj klare videblis belegaj neĝaj montopintoj, en la ĉirkaŭa arbaro facile ni povis vidi diversajn bestojn. La vojo gvidanta al la ejo estis tiom mallarĝa kaj sinuoza, ke ĉe la renkonto de du aŭtoj la supreniĝanta ĉiam devis retroveturi al unu el specialaj lokoj por preterlasi la renkontan.

La supra foto estas farita dum la koncerto de la fama dana/pola/bosnia grupo "Esperanto-Desperado". La apuda prezentas ĉiujn (eks)rusiajn partoprenintojn de la festivalo (krom Garik Kokolija, kiu fotis). En la unua vico sidas Tatjana Ŝĉukina (Kulebaki-Germanio), Aleksandr Mikiŝev (Israelo), Boris Eliasson (Moskvo-Germanio), malantaŭ ili videblas la moskvaninoj Jelena Budinovskaja, Marija Jegorova kaj Jelena Morozova, kiuj triope venis al Italio petveture kaj per tio vere mirigis la okcidentanojn.

Garik Kokolija (Moskvo)

REGo (Rusia Esperanto-Gazeto) ***№ 3 (10) majo 2002***

komuna eldono de REU kaj REJM

redaktas Garik Kokolija *retadreso* <gazeto@mail.ru>

poŝta adreso Pjatnickoje ŝosse 45 – 105, 125310 Moskvo, Rusio

por tiu ĉi numero kunlaboris Viktor Aroloviĉ, Grigorij Arosev

la gazeto estas produktita en la presejo "Policvet" (Klin)

abontarifoj por 2002:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 100 rubloj sendendaj al:

Георгий Владимирович Коколия, Пятницкое шоссе 45 – 105, 125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 15 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** *ĉe UEA*